


5/6 ☆ 1994 ☆ 162

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



*Amon, pacon kaj felicon
en la jaro 1995!*

Čestmír Vidman

P.F. 1995

Dlouhá je cesta za jasem
Nad glóblem zataženo
Přemoz tmu denním zápasem
Naděje hledej jméno

Vzývej čistotu oblohy
štědrý svit na svět malý
kde doutnák zloby pod nohy
házi zákeřník vytrvalý

Díváš se stále s úžasem
na probouzející se listí
Kdyby už vlídnost přišla sem
místo nenávisti

František Kožík

P.F. 1995

Po hvězdě, jež se první objeví,
zdravím ty drahé, kteří odešli mi ...
A tíše, ústy prokřehlými,
zpívám zpěv věčné oblevy.

Tou druhou hvězdou zdravím lásky.
I když vzplály jen šťastnou chvílí,
můj život touze zasvětily.
Mám po nich v duši vděčné vrásky.

A třetí z hvězd? Ať záře její
pohladí jako dlaní jemnou
ty, kdo jsou dosud věrně se mnou.

Dokud mi hvězdy vycházejí.

Esperantigis Josef Rumler:

Longa estas vojo al la sereno
Nubkovritas globo de la tero
Per taga lukto venku la tenebron
serĉante la nomon de espero

Adoru firmamenton ties purecon
lumeton sur etan mondon donace
falantan
kie la eksplodŝnuron de furiozeco
sub la piedojn ĵetas persista insidanto

Vi rigardas senĉese mire
la vekigantajn foliojn
Venu jam afablo ĉi-tien
anstataŭ odio.

Senrime esperantigis M. Malovec:


Pere de stelo, kiu unua ekbrilos,
salutas mi la karajn, kiuj forlasis
min...

Kaj softe, per lipoj frostigintaj,
mi kantas kanton de eterna degelo.

Per dua stelo mi salutas miajn amojn.
Kvankam ili flamis nur feliĉan
momenton,
mian vivon ili konsekris al sopiro.
En mia animo postrestis dankaj faltoj.

Kaj la tria stelo? Ĝia brilo
karesu kvazaŭ per polmo delikata
tiuajn, kiuj ĝis nun fidelas kun mi.

Dum miaj steloj ankoraŭ aperas.



La sortobata jaro 1994

Jaroslav Mařík

Mi ĉeestis ekde 1938 sennombran kvanton da komitat-kunvenoj de nia landa Asocio kaj kiel prezidanto de la Prepar-komitato de ĈEA alportis el la ministerio la permeson fondi ĝin kaj sekve mi estis ĝia estrarano dum pluraj jaroj, kion ĉesigis la atribuita „honora membreco“. Kiel tia mi do sentis kiel mankon subite elfali el la etoso de la komitat-kunvenoj sen ebleco, fare de la komitatestro, reĉeesti gaste iun el la laborkunsidoj. Nur la nuna prezidanto V. Kočvara lasis min ĉeesti junian komitat-kunsidon kaj konatiĝi kun la labor-etoso kaj enhavo. Konklude mi diras: mi estis kontenta pro la elana aktiveco, precipe de la prezidanto, de Hasala kaj Polnický, asistataj de Patera, Malovec, Jandová kaj Hubnová. Kun rekono mi vidis, kiom da taskoj surprenas la prezidanto.

Tiu laborkunsido solvanta ne facilajn taskojn impresis min edife kaj igas min kredi, ke la sorto de nia movado tamen estas en bonaj manoj. Tion ĉi mi konstatas por' la membraro de ĈEA, el kiu iu plendas nenion scii pri farado aŭ nefarado de la asocia gvid-organo.

Ankaŭ la Klubon de Prago trafis plago, en junio: perdo de la klubejo. de la valora biblioteko kaj de la Zamenhof-busto, transportitaj en la muzeon en Česká Třebová. Ĉi tie kiel honora klubestro mi opinias taŭga mencii la penigan fizikan laboron de s-anoj Sviták (ŝargado kaj krome prizorgo de ŝarg-aŭto), la prezid. Patera (tiu ĉi inkluzive de kunveturo vespera al Ĉ.Třebová), de s-inoj Bínová kaj Hubnová; ĉe transporto de la meblaro en sudurban kelon (de s-ro Štěpánek) ankaŭ la vicprez. Ondráček.

Restas nostalgia deziro pri "bona farto" de la biblioteko kaj de Zamenhof en la ekzilo!

P.S. - Nur posttempe Praha sciigis, ke ĝia posedajo ne plu estos reakirebla, iam estonte, el la muzeo en Ĉ. Třebová!

Rimarko de la redakcio: S-ano Pištora en Česká Třebová precizigis, ke la redono estos ebla, sed iom komplika pere de la kulturministerio. Verŝajne pro tio, ke la muzeo profesie prilaboras kaj katalogizas la bibliotekon, kompletigas ĝin per novaj volumoj, do ĝi estos pli valora ol nun.

Zamenhof en ekzilo

Jam tri plagojn de la ĉeĥa Movado mi travivis: 1941 - Hitler, 1952 - Stalin, 1994 - la demokratia ekonomia libereco. Pro volo de domposedantoj estis likvidita la oficejo kaj librovendejo de ĈEA, en junio devis likvidi sian sidejon la Esperantista Klubo en Praha. Ĝia biblioteko dum 90 jaroj starigita, kun preskaŭ sep mil volumetoj kaj gazetaj jarkolektoj (en 1980 la tria plej granda societa biblioteko en la mondo, post Londono kaj Rotterdamo), kun la honora epiteto laŭ la mecenato „Jaroslav Šustr“, devis, por savi sin, translokiĝi en la muzeon de la urbo Česká Třebová, kiun direktoras s-ano Pištora (la muzea deponejo troviĝas en estinta ruĝarmeja kazerno apud la urbo).

Kun la biblioteko devis elmigri tien la granda oreca busto de L. L. Zamenhof (vidu Heroldon de E., 2/1853-1992), kiu estas troninta al la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago 1921, kaj plaĉis al la edzino de LLZ. - Mi mem (80 j.) aldonis ĉ. 100 kg de miaj 48 E-gazetoj, por eble savi ilin

antaŭ postmorta detruo. Nun restas al mi la tasko likvidi antaŭmorte mian propran E-bibliotekon.

Kiam vi povos reveni sur vian lokon en Prago, Ludoviko? Eble dum la venonta UK 1996 tie?

J. Mařík, hon.m. ĈEA kaj UEA

**MĚSTSKÉ MUZEUM V České Třebové,
oddělení: „HISTORIE ESPERANTA V
ČESKÝCH ZEMÍCH“
Zpráva za rok 1994**

Oddělení shromažďuje i nadále veškeré materiály z historie i současné činnosti esperantských klubů.

Jako loňského roku tak i letos nám docházejí zprávy o akcích pořádaných jednotlivými kluby (Strážnice, Česká Třebová, Ostrava-Vítkovice, sekce železničářů a další) i hodnotné knižní dary (ĈES, KAVA-PECH a další).

Nejhodnotnějším darem roku 1994 je knihovna pražského esperantského klubu v přibližném počtu asi 6500 knih a časopisů. Evidence knih z této knihovny zaměstnává 2 dobrovolné pracovníky, z toho jeden je esperantista, člen zdejšího E-klubu Jan Kovář. Práce postupuje pomalu, protože při evidenci knih pro muzeum se musí na evidenční karty vypisovat nejen spisovatel a název, ale i další náležitosti. Celkový počet knih včetně neevidovaných je cca 10 tisíc kusů.

V roce 1995 má Městské muzeum v České Třebové obdržet další místnosti pro depozitář a je předpoklad, že jedna místnost by mohla být použita jen pro esperantské materiály. Vystavní prostory má muzeum dosud velmi omezené, a to 1 místnost v depozitáři, kde kromě dvou betlémů jsou vystaveny vyřezávané „esperantské jesličky“ darované muzeu

dlouholetým esperantistou, p. F. Váchou z Jaroměře.

Materiály z činnosti a hist. esp. hnutí soustřeďujeme ve velké skříni a rozdělením na jednotlivé kluby. Jejich evidenci zpracování bude provedeno později.

(Jiří Pištora, správce muzea)

Nova rektoro kaj sesdekjarulo

Prof. RNDr. Vlastimil Novobilský, CSc., ekde 1995-02-15 sesdekjarulo, estas eksperto pri anorganika hemio, eksprezidanto de Ĉeĥa societo de AIS (San Marino), de la junaĝo ĉiam aktiva esperantisto, klubprezidanto, instruanto kaj ekzamenanto en Someraj Esperantotendaroj. Lia student-aĝa „Skizo pri la Esperanta Literaturo“ (74 p., 1957) estis recenziste agnoskita kiel la unua tiuspeca historia verko. Aŭtoro de bibliografio „Ĉeĥa literaturo en Esp-o; Esperantaj verkoj far ĉeĥaj aŭtoroj“ (ĈEA, Praha, 1983, 30p.). Li aktive partoprenas, parte kun la edzino Věra (vjera), filino de la poeto Jiří Kořínek, en la jam famkonataj aŭtunaj kultur-festivaloj „Ĉeĥaj-Saksaj Tagoj“ (ĈESAT) en Ústí nad Labem. Ankaŭ lia patro Jaroslav estis tre aktiva esperantisto, tamen pereinta (1942) en la koncentrejo Mauthausen. - Lia filo Vlastimil estis elektita, en decembro 1994, rektoro de la Universitato en Ústí, kun ekdeĵoro de 01-03-95.

La prezidanto de ĉeĥa Esperanto-Asocio Vlastimil Kočvara jam vidas en li kandidato je Rektoro de la Kongresa Universitato de UK 1996 en Prago.

(J. Mařík)



**Esperantistaj jubileoj
kaj memordatoj en 1995**

Vivaj jubileoj de vivantoj

6. 2. JUDr. Sádlo-Páv Pravoslav
(ĉefrolanto de Verda Ĉaro) 70j
15. 2. RNDr. Novobilský Vlastimil, CSc,
univ. rektoro, 60j
4. 3. Vychodil Jiří, 55j
12. 3. Seemannová Eva, aktorino, 75j
12. 3. Staňura Adolf, 80j
16. 4. Patera František, 75j
13. 5. Tvarožek Ed.V., 75j
30. 5. Šruncová Helena, 70j
8. 7. Růžičková-Pavlinová Alena, 75j
11. 6. Karen Jiří, poeto, 75j
13. 7. Špūr Václav, 80j
15. 7. Hemerková Mílada, 70j
28. 7. Leraus Vladimír (Verda Stacio),
90j
6. 8. Franc Karel, 70j
18. 8. Patera Jiří, 60j
28. 8. Bala Ladislav, 75j
9. 9. Řezáč Zdeněk, 75j
6. 12. Píč Karel, verkisto, akademiano,
75j

**Naskiĝis antaŭ tiom da jaroj
(mortintoj)**

29. 1. Hybeš Josef, aŭstria deputito, 140j
27. 1. Chalupa Dalibor, 95j
28. 1. Chaloupecký J.F., 105j
14. 4. Krajíc Ladislav Ing., 90j
14. 5. Zemek Jan, 100j
24. 5. Junck-Bílková Rosa, 145j
3. 6. Slanina Antonín, 90j
17. 6. Klement Jaroslav, 60j
5. 8. Staněk František, 90j
2. 9. Baldová Marie, 90j
11. 8. Slavík František, 95j
11. 9. Hromada Rudolf, 105j
28. 9. Rosický Václav, 145j
1. 10. Procházka Karel, 115

10. 10. Krumpholc Josef, 125j
21. 11. Čánský Václav, 115j
22. 11. Klement Urban, 115j
Hradil Jan, asocia prezidanto, 90j
Filip Karel, 80j

Mortis antaŭ tiom da jaroj

- Jokl Vladimír, 35j
Kožený Josef, 35j
Krumpholc Josef, 45j
Omelka františek, 35j
Rebíček Josef, 35j
Šolc Karel, 25j
Pitlík Augustin Dr., 35j (4. 4.)
Barviř Josef, 40j
Odehnal Antonín, 10j
Pechoč Václav, 10j
Zemek Jan, 35j (27. 12)
Macan Karel, 70j (6. 2.)
Strejčková-Šamlová Marie, 25j, (30. 4.)
Šupichová Julie, 25 j
Šusta Josef, prof., ministro, 50j
Bárochová Anna, 20j (26. 4.)

kompilis J.Mařík

Niaj tendaroj

IKUE-Tendaro en Sebranice

Sub ŝirmo de Virgulino Maria okazis de la 13-a de julio ĝis la 16-a de aŭgusto 1994 en Sebranice apud



Litomyšl jam la 13-a IKUE-tendaro. En Sebranice estis la nunjara tendaro la kvara sinsekve aranĝita post ruiniĝo de totalisma sistemo. Sed ĝia graveco estas vere eksterordinara. Partoprenis ĝin ne nur niaj samlandanoj, sed eĉ gastoj el 6 landoj.

Ciu tago komenciĝis per veko-kanto, kiu tamen ne ĉiam sukcesis veki ĉiujn dormantojn. Post refreŝiga gimnastiko kaj persona higieno okazis ĉiutemate la plej grava okazaĵo - esperantlingva sankta meso celebrata de pastroj Lajos Kóbor el Hungario (vic-prezidanto de IKUE) kaj dominikana pastro Savio Řičica (spirita gvidanto de la Ĉeĥa IKUE-sekcio). Post la spirita satigo ankaŭ la korpo ricevis sian nutraĵon. Pri tiu ĉi grava tasko zorgis kuirejaj helpantoj sub gvido de fratinoj Zdenka Novotná kaj Drahomíra Dudová. Satiginte la korpon kaj la animon, ni povis okazigi matenan ordonon kun solena hiso de la IKUE-flago, dum kiu oni kante petas de Dio benon por Esperanto.

Antaŭtagmeze okazis ĉiam tri instrueroj de Esperanto. Kurson por komencantoj gvidis fratino Daria Michalová, kiu per ĝi ĵus komencis sian instruistan karieron. Kurson por progresantoj post pasintjaraj spertoj gvidis alia juna fidela tendaranino el Slovakio Anjo Němcová. Ĉe-metodan kurson gvidis du personoj, reprezentantaj generaciojn junan kaj tiun pli aĝan, ĉar frato Láda Mlejnek sentas bezonon trovi konvenan anstataŭanton por instruado de Ĉe-metodo. Tiucele li elektis esperdonan junulinon, fratinn Manjo Koblížková, kiu post nunjaraj spertoj kaj personaj preparoj jam memstare venontjare gvidos kurson laŭ ĉi tiu metodo. Estas ĝojige,

ke inter la tendaraj kursgvidantoj trovatas tri junulinoj, ĉar ni pli aĝaj organizantoj sentas neceson iom post iome meti sorton de la tendaroj, do ilian estontecon, en la manojn kaj sur la ŝultrojn de junaj homoj. La konversaciajn kursojn gvidis fratinoj inĝ. Johano Kalný kaj Lubomír Obruča. Tre gravajn rolojn plenumis frato Jaroslav Žák - mastro de la tendaro, zorgante pri provizado de la tendaro per necesaj varoj, - kaj fratino Irena Szczygłowska el Pollando, kiu kiel kuracistino zorgis pri sanstato de la tendaranoj.

La plej ĉefa loko kaj centra punkto de la tuta tendaro estas la tendara kapelo, situanta meze de la rondforma tendarvico. En ĝi ne nur estis celebrataj sanktaj mesoj kaj okazadis Anĝelusoj, ĵaŭda adorado aŭ vendreda sufervojo kaj ĉiutagaj rozariaj preĝoj, sed en ĝi senĉese loĝadis kun ni kiel tendarano nia Frato, Sinjoro Savanto kaj Dio Jesuo Kristo en la Plej Sankta Sakramento. Nu kaj ĉeesto de Dio en la tendaro estis garantio, ke tie regos harmonio kaj Krista amo. Kaj fakte tiel estis. Kiel infanoj de Maria, konsekritaj al Ŝia Senmakula Koro, estis ĉiuj kaŝitaj en Ŝia Koro kaj ŝimitaj per Ŝia patrino mantelo. Ŝia bildo, prezentinta Marian kiel Mistikan Rozon - donacita de germana frato Will Wirges, ornamis tendaran ofertablon, ĉar Maria ja efektive ĉeestas ĉie, kie trovatas Ŝia Filo Jesuo en Eŭharistio.

Posttagmeze, post tempo dediĉita por liberaj okupoj, ripozo, banado, okazis prelegoj, paroladoj, ludoj aŭ ekskurso al historia urbo Litomyšl. Per rozaria preĝo estis ĉiam esprimita danko al ĉielaj Paĉjo kaj Panjo pro belege travivitaj tagoj. Poste sekvis vesper-

manĝo, vespera ordono kaj vespera programo en la tendarspaco aŭ ĉe la fajro.

Dimanĉajn sanktajn mesojn ni solenis en plenplena paroĥa preĝejo kun paroĥanoj en Sebrance, pri kies spiritaj bezonoj zorgas salezianoj.

Por fulmotondrado, pluvo kaj eventuala hajlo estis destinitaj merkredaj posttagmezoj de ĉiu semajno.

En la tendaro okazis du gravaj eventoj. La unua estis surpriza vizito de helpepiskopo de la diocezo Hradec Králové mons. Jozefo Kajnek, kiu venis precize kiam finiĝis la rozaria preĝo. Do li povis ĝin finiĝi per episkopa beno. Poste tutan vesperon ĝis noktaj horoj li restis inter la tendaranoj, ĝuante la agrablan etoson ĉe la tendara fajro. Nur malvolonte li forlasis la tendaron, ĉar li bone rememoras la spiriton de iamaj tendaroj en Herbortice. Kaj en la tendaroj en Sebrance plu vivas la spirito de tiuj iamaj.

La kulmino de ĉiuj okazaĵoj estis pontifika sankta meso tute en Esperanto celebrata de episkopo de la diocezo Hradec Králové mons. Karlo Otčenášek - patrono de la ĉeĥaj katolikaj esperantistoj. Kunebris pastroj Lajos kaj Savio. Dum ĝi okazis sinkonsekreto aŭ renovigo de la sinkonsekreto de nia aktivado kaj la tuta E-movado al V. Maria. Antaŭ fino de la sankta meso kaj antaŭ la sinkonsekreto la episkopo Karlo diris:

„En Velehrad ni grandpompe kaj egnombre konsekris nin al Virgulino Maria. Nun ni estas ĉi tie relative malmultaj kompare al la centmilo da kredantoj. Sed ni devas rememori la vorton de Sinjoro Jesuo, ke Li aparte amas tion malgrandan. Dependas do tre de nia koro, kiel la konsekra preĝo

agrablos al Dio. En komenco mi diris, ke mi venas de la katedralo de Sankta Spirito, kiu eble estas la unusola konsekrita al Spirito sankta en la mondo. Bonvolu ĉi Spirito sankta malfermi niajn korojn por granda Dia graco.“

Post la konsekra preĝo kaj fina beno la patro episkopo aldonis:

„Hierau mi estis en Germanio, en la granda urbo Paderborn. Tien venis pilgrimantoj al sankta Liborius el tuta Germanio. Dum tuta semajno tie daŭris la festoj. Ĉeestis episkopoj el ĉiuj kontinentoj. Ĝi estis do tre kuraĝiga. Sed tiu ĉi hodiaŭa nia renkonto laŭ mia opinio neniel por mi malgravas. Mi dankas al vi por la kuraĝigo, kiun mi de vi kunportas. Persistu!“

Do, tiu ĉi tago estis fakte unika en la historio de E-movado, ĉar ankoraŭ neniam okazis, ke episkopo celebris sanktan meson en E-tendaro. Fakte, tiu ĉi tendaro mem estas unikaĵo, raraĵo en E-movado, ĉar ĝi estas ununura katolika E-tendaro en la mondo. Tiu ĉi grava okazintaĵo ŝajnas esti kvazaŭ nura songo aŭ revo. Feliĉe, ĝi estas realaĵo. Kaj ne nur realaĵo, sed vera raraĵo kaj unikaĵo, ĉar ĝis nun en historio de la katolika E-movado kaj ĝenerale mem en la E-movado okazis neniam pontifika sankta meso kun sinkonsekreto al V. Maria. Ĉu tio ne estas klara pruvo, ke Dio nin amas, ke la aktivado de la katolikaj esperantistoj plaĉas al Li? Liaj benoj kaj ceteraj ĉielaj donacoj ne lasas nin dubi pri Lia amo kaj favoro kaj pri amo de nia ĉiela Panjo. Por ĉiuj sukcesoj kaj neforgeseblaj travivaĵoj ni dankas al Triunua Dio, la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito kaj al nia ĉiela patrino V. Maria, kies infanoj ni estas.

(Miloslav Šváček, el „Dio Benu“)

Gazetoj aboneblaj

MONATO internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo, eldonas Flandara E-Ligo en Belgio, aperas 12 numeroj jare, abonkotizo por 1995 estas 405 Kč. Peranto V. Hasala.

EL POPOLA ĈINIO monata, la plej bela E-revuo, prezentanta historion kaj kulturon de Ĉinio, ankaŭ ekonomion kaj sciencon, artikoloj pri la movado de eksterlandaj esperantistoj, abonkotizo 430 Kč, specimenan ekzempleron kontraŭ 30 Kč. Peranto V. Hasala.

INTERLIGILO organo de Internacia poŝtista kaj telekomunikista E-asocio, abono 55 Kč, peranto V. Hasala.

AMIKECA RETO servo de SAT por vojaĝi novmaniere, kun amika babilado, sportado, muzikado aŭ jogo k.s., peranto V. Hasala.

SENNACIULO presorgano de SAT, abonkotizo 400 Kč (kun jarlibro), peranto V. Hasala

LA MIGRANTO organo de la esperantistoj naturamikoj, abono 45 Kč, peranto V. Hasala (petu provekzempleron)

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR) organo de ILEI - Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), aperas 4 numeroj jare, abono identas kun membreco en ILEI, por Ĉeĥio 100 Kč deponeblaj ĉe subkonto de ĈEA (variebla simbolo 789.71), peranto M. Malovec

JUNA AMIKO internacia kvaronjara lerneja E-revuo, kiun eldonas ILEI por geknaboj, peranto V. Hasala

LITERATURA FOIRO luksa kultura revuo (rakontoj, poemoj, recenzoj, ilustraĵoj), 6 numeroj jare, abono 380 Kč aŭ 440 Sk, peranto A. Bednařík (ankaŭ por libroj, kasedoj, vidbendoj de

Kooperativo LF),

petu senpagan ekzempleron

HEROLDO DE ESPERANTO la plej fama informilo pri la E-movado, jarabono 400 Kč, peranto P. Polnický.

ESPERANTO monata organo de UEA, abonkotizo estas samtempe membrokotizo de UEA, peranto L.Rýznar

STARTO la organon de ĈEA vi povas aboni ankaŭ por viaj amikoj, jarabono 48 Kč (enlanda poŝto) aŭ 120 Kč (sendado eksterlanden, ankaŭ en Slovakio), peranto M. Malovec

Perantoj:

Vladislav Hasala, p. s. 34, 696 62 Strážnice

Ing. Aleš Bednařík, Lotyšská 8, 821 06 Bratislava, Slovakio

Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady

Linhart Rýznar, Antonina Slavička 22, 568 02 Svitavy

Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno

MONDA TURISMO →

Ričan proponon de turismaj aranĝoj ricevis nia redakcio de Internacia Asocio „Monda Turismo“, str. Skłodowkej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando, tel. (48-52) 415744. La materialo estas pli ampleksa ol Starto, tial ni nur atentigas la interesitojn, ke perantoj por Ĉeĥio estas d-ro Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, por Slovakio d-ro Elemír Erby, Kukučínova 30, 04001 Košice.

**AUTOBIOGRAFIA RAKONTADO
PRI
NENORMALE NORMALA VIVO**

**Gerrit Berveling: LA UNUAJ 25
JAROJ EN MIA MEMORO**

Eldonis la aŭtoro en serio VOKO (numero 19) en Breda, Nederlando 1994. Formato 15 x 20, paĝoj 80, prezo neindikita. Adreso por mendi la librojn aŭ skribi al aŭtoro: Muiderslotstraat 69, 4834 KM Breda, Nederlando.

Por bone kompreni dum la legado la verkojn de la aŭtoro, oni bezonas **ne nur legi kritikojn kaj verkon de la aŭtoro, sed vere al ni helpas, ke mem la aŭtoro aŭtobiografie rakontas pri sia vivo.** La verkoj respiegulas ofte la vivon kaj intencojn de la verkisto, sed ofte tre fikcie kaj ne adekvate al realaĵoj. Por tiu ĉi enkonduko kaj ŝlosilo al verkaro de Gerrit Berveling (kaj li nur komencis sian karieron verkistan) ni vere dankas kaj **mi instigas aliajn aŭtorojn verki tiun ĉi aŭtobiografion.** En alia maniero tion faris jam Edwin de Kock en sia poemaro VOJAĜOJ sub titolo: Iom pri mi kaj mia verkado. Responde al demandoj de Jiří Karen.

La libron de G. Berveling mi legis **ĝue kaj kun streĉo.** Min kaptis absolute senriproĉa vereco kaj **sincereco** rilate al personaj intimaĵoj pri kiuj oni ofte dece mutas. Mi bedaŭris, ke la aŭtoro verkis nur ĝis la jaroj 1968/1969 al momento, kiam li ekkonis sian edzinon Madzy. **La aŭtoro certe daŭrigos la verkadon kaj mi ĝoje atendas tion.**

Li verkas pri **normala vivo,** neniuj sensacioj kaj iluziaĵoj. Tamen tiu vivo estas certasence eksterordinara - lia

vivo estas *normale* normala. Al mi mankas tempo por legi librojn, sed mi, preninte tiun libron enmanen, mi ne povis ĉesi kaj mi legis ĝisfine kun kraĵono enmane kaj tiom da inspiraj momentoj mi trovis ĉi tie, ke mi ne povis paŭzi. Kial?

La aŭtoro parolas pri si mem entute **objektive, memkritike, aperte kaj sincere kvazaŭ li objektive observus sin kiel la fremdan objekton.** Li parolas pri sia familia kaj parenkaro, ĉefe pri la patro en maniero intime *deca.* Li ne sekretigas la problemojn de la gepatroj, de lia rilato kaj rilato de liaj samgenaskitoj al si reciproke kaj al gepatroj. Komplika afero estas la familia harmonio en tempo de eduka revolucio, kiu ofte ŝanĝiĝas en la anarkion de la junularo. **Do konfrontado de du mondaj generaciaj estas tre interesa.**

Antaŭ niaj okuloj paradas sursceneje liaj **kamaradoj, instruistoj kaj profesoroj,** kiuj lin enkondukadis en la spiritan mondon de la literaturo kaj filologio kaj lingvistiko, sed ankaŭ en la sferon de la teologio kaj filozofio. Ne nur modernaj lingvoj, sed ĉefe la klasikaj: helena kaj latina kaj certagrade eĉ hebrea formis lian profilon kaj preparadis lin por la futuraj laboroj en tiu sfero. Malmulte oni agnoskas meritojn de G. Berveling pri **apertado de la klasika kulturo al ĉiuj esperantistoj.** Serio „Voĉoj kristanaj“ (22 numeroj) kaj serio „Voko“ (19 numeroj), ne parolante jam pri poemlibroj, artikoloj, redaktado de revuo FONTO ktp. ne povus naskiĝi en tiom mallonga tempo en tiu ĉi **bravura lingva preparado.**

Stilo de Esperanto ĉe G. Berveling klare montras signifon de tiu ĉi lingva kaj filozofie-teologia preparo por liaj

taskoj. **Helena kaj latina literaturoj** estas lia domeno, kie li elstaras - kaj tion scias legantoj de la revuo Simpozio - filozofia revuo eldonata de prof. E. Paŭli en Brazilo, ankaŭ ne sufiĉe konata kaj aprezata de la esperantistaro.

Tre interesa estas temaro de lia **sekse-ina vivo**. Li estis edukita ekstreme severe en rilato al vivo morala en romkatolika familio. Lia idealo estis jam de junaĝo fariĝi pastro. Kontraŭ volo de gepatroj li komencis studi en la seminario. **Priskribo de la seminaria vivo apartenas al tre interesaj ĉapitroj de la libro**. Atentinda legi ĝin por la edukantoj de la futuraj pastroj. Severa disciplino, kiu kontrolas sentojn, ideojn, ĉiujn vortojn, kion legas, kien iras la studento, provokas nature la opozicion de sane evoluanta junulo. Kortuŝa estas la priskribo de lia **unua amo al Anja, al Vera kaj aliaj inoj**, kiujn li renkontis en la vivo. La libro montras, kiun grandan ŝarĝon posttrenas homoj edukitaj en **absoluta nescio pri la homa korpo kaj ĝia seksa funkciado**. Nia edukado iras vojojn ekstremajn: **iam oni malpermesis ĉion eĉ tion vere naturan kaj sanan kaj hodiaŭ oni permesas ĉion**. Harmonion kaj balancon inter asketa, celiba edukado kaj natureksa oni devas trovi plej rapide por la bono de la estonta mondo.

Tre interesis min la priskriboj de la **vagado tra la urboj, de la turistado en variaj landoj de Eŭropo**. Ĉefe lin interne trafis eblo kompari la „moralon“ de la lando de trans fera kurteno (Jugoslavio) kun la hejma. Vagado sen multe da mono kaj uzado de la kono de lingvoj estus bona averto por la junularo, kiu vagabondas ne sciante lingvojn. Malfacilaĵoj en homaj rilatoj surbaze de nekono de lingvoj certe influis la aŭto-

ron por ekinteresiĝi pri Esperanto. Sed pri tio li certe rakontos en futuro. Ankaŭ metodoj **kiel gajni monon kiel studento kaj ne ŝarĝi poŝon de la gepatroj** estas instrua - ĉefe en landoj postkomunistaj - kie oni ĉion atendas ricevi de la stato kaj siaj familianoj sen propra laboro.

Interesa estas legado pri **hobioj** de la aŭtoro, pri problemoj de la loĝado. Kiu volas koni la situacion de la studento en eklezia seminario kaj en la universitato, legu, instrua estas la libro.

Tion rilate al **enhavo**. Duan parton mi devas akcenti kaj tie ĉi la **lingvon kaj lingvan stilon** de la aŭtoro. Legado estis por mi ega ĝuo. **Neniun vorton mi devis serĉi en la vortaroj, mi komprenis la tekston senprobleme**. Stilo estas diafane logika, trasidebla, klara. Tamen la legado scias **provoki ĉe la leganto lian fantazion, sentojn, emociojn**. Danke al fakto, ke G. Berveling ne uzas tro multe vortojn kreitajn per **finajoj kaj komplikaj kunmetaĵoj**. Ĉiu nocio havas sian vorton kaj TIO mankas al multaj aŭtoroj. Lingve bazita nur sur **logikaj konstruaĵoj baras vojon al tiu ĉi emocie-fantazia travivado de la teksto**. Vivanta, belsona, kurta por prononco, inspira kaj imagopova lingvo. Pri bagatelaĵoj kaj eraretoj meditu la gramatikistoj. Mi ĉiam aprezas unue la sencinon, etoson kaj kontribuon de la aŭtoro. **Liaj frazoj ne frazas, la teksto fluas nature kiel la rivero**.

Gratulon kaj rekomendon al legantoj.

Recenze legis prof. Ladislav Podmele

10. 11. 1994, PRAHA

Gerrit Berveling

ĈIES ĈI TERO

*Neniu petis pri la rajto
naskiĝi
kun sama decodev'
kun sama zorgopez'
kun samsenhelpe cerbo*

*ni staras sur ĉi mondo
infane senpovaj
sensciaj*

*nur
kun senlaca soifo
senhalta aspiro*

je spaco, amo, paco

ĉu tio do - vivo?

*neniu petu pri la rajto
je morto*

(El poemaro „Tri 'stas tro“)

**BELARTAJ KONKURSOJ
DE UEA EN 1995**

La Belartaj Konkursoj estas unu el la plej longe daŭraj institucioj de la Esperanta kulturo. La antaŭ ne longe forpasinta Reto Rossetti iniciatis ilin en 1950. El inter centoj da verkemaj esperantistoj, kiuj ĝis nun partoprenis en la Konkursoj, aperis plej multaj el la nomoj, kiuj difinas la Esperanto-literaturon de la dua duono de nia jarcento. En 1994 la Belartaj Konkursoj havis malpli sukcesan jaron tiel kvante kiel kvalite. Tiom pli forte do UEA invitas konkursi pri la premioj, kiujn oni aĵuĝos en la UK en Tampere.

Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200x65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 80-a UK: „Ni, la popoloj - unu mondo aŭ disaj eroj?“. Premio „Luigi Minnaja“.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio „An-okin“.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistema VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1994. Unu premio.

Alsendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1995. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1995. Ĉion oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Oni aldonu 5 internaciajn respond-kuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas.

Premioj: Unua premio: 390 gld. Dua premio: 273 gld. Tria premio: 156 gld. „Luigi Minnaja“ kaj „An-okin“: 390 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita) 273 gld. Infanlibro de la Jaro: 819 gld.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkuponon ĉe UEA.

Sub kovrilo de gastronomio
Marta Lorková

Mi ne scias kiel vi, sed aŭdante la esprimon gastronomio, tuj antaŭ miaj okuloj elstaras longaj tabloj plenaj de bongustajoj kaj frandajtoj.

Sed antaŭ ol ni eksidos al ĉi tiu riĉa tablo, necesas, ke ni pritraktu kelkajn sufiĉe gravajn aferojn.

La unua demando povas esti: kun kiu ni intencas travivi ĉi tiujn agrablajn momentojn dum la konsumado de antaŭviditaj bongustajoj, sed ankaŭ de pli simpla manĝaĵo. Do eble temas pri vespermanĝo kun amikoj. Bona gastiganto tre zorgeme pripensas elekton de invitotaj gastoj. Nome, same kiel diversmaniera kunmetado de manĝopartoj kreas tute varian manĝon, ankaŭ pere de konvena aŭ malkonvena kunmetado de gastoj oni kreas bonan aŭ malbonan societon. Ĉe dubo estus pli bone diri antaŭe al la gastoj, kiun oni intencas inviti kaj ĉe la fina decido ne malatentu deziron de la invititoj. „Estu hodiaŭ nia gasto“, diris iu angla lordo al Jonathan Swift, „jen la manĝokarto!“ La verkisto respondis: „Prefere montru al mi liston de viaj gastoj.“ Finfine jam antaŭ longe formulis la samon romia filozofo Seneko jene: „Prefere necesas zorgi, kun kiu ni manĝos, ol kion ni manĝos.“

Kaj nun ni alpaŝu al la arto de banketado. Oni ne povas unuflanke diri, ke ĉi tiu artospeco en la nuna tempo tute dekadencis. Ĉe festaj okazaĵoj scipovas niaj virinoj aranĝi la tablon tiel, ke ne hontus pri ĝi eĉ frekventinto de hotela lernejo. Sed tamen, oj! Labortagon karakterizas ne la banketado, sed la postarado. Matene ĉiu haste matenmanĝas ĉe telerŝranko, tagmeze oni staras ĉe

fenestreto en kantino, kaj vespere la familianoj venadas unu post la alia, kaj ĉiu manĝas ion alian. Kvazaŭ estus forgesita la saĝo, ke unu komuna manĝo estas mastika pilastro de la familio. Ĉar ne temas pri manĝo, sed ankaŭ pri interparolo, pri dialogo, pri bona sento, ke ni apartenas unu al la alia, ke ni ne diras reciproke: tio estas via problemo, sed kontraŭe: via problemo estas ankaŭ mia problemo.

Ĉe la komencoj de la banketado nepre ne estis tablo. Nia prapatro Janeček, kiel lin nomas en sia rakontado Karel Čapek, ĉaskaptis, ni diru, ekzemple mamuton, komune kun aliaj ĉasistoj el la bando ĝin altiris en la tendaron, kie sur ĝin ĵetigis manĝemuloj kaj formanĝis ĝin nekuiritan eĉ kun tripoj. Oni povas imagi, ke iam la senfeligitan mamuton frapis fulmo, viandon brutuŝis, kaj la miranta prapatro Janeček ĉirkaŭlekis kun apetito la unuan rostajon.

Pri la bankedado ni povas paroli, nur kiam estiĝis la unua restadejo. Tie prapatrino Janeček jam rezervis angulon por manĝado kaj eble en la mezo starigis vazon el arboŝelo kaj enmetis en ĝin floron, kiun prapatro Janeček formanĝis pensante, ke temas pri deserto.

Kaj kio poste? Kompare al Romianoj vivis la cetera Eŭropo je malalta nivelo. Nur post la migrado de nacioj en la 6-a jarcento post Kristo, slavaj kaj ĝermanaj nacioj definitive ekloĝis kaj tial la bankedado havis jam pli riĉan formon. Komprenoble ekz. tablo, malnovslava “stol”, estis malalta benko, kiu servis ankaŭ por sidado (komparu kun: knížecí stolec) kaj ĉefe loko por diversaj hejmlaboroj (koneksis kun la greka stello, germane Stuhl).

Kompreneble en kontakto kun la kulturoj bizanca kaj romia la bankedado rapide disvolviĝis kaj en la tempo de kronikisto Kosmas en la XI-a jarcento alta tablo jam estis ordinara meblo.

Do, jam ni sidas ĉe la tablo kaj kio nun... Dum la manĝado oni parolas. Estas nome pruvite, ke humoraj paroloj de amikaj karakteroj intensigas apetiton kaj ĝojon el la manĝado. Sekve de tio, la gepatra diraĵo: „Dum la manĝado oni ne parolas“,

al sano malutilas. Ĝi havas sendube tre antikvajn radikojn. Iu ĉina vojaĝanto sciigis en la 5-a jarcento pri sia vojaĝo tra Bharato, ke en tiu ĉi lando estu ĉe la festeno kiom ajn multe da gastoj, nur post fino, post manlavado kaj buŝellavado, estas permesite paroli. Kaj kiam A. P. Ĉeĥov je unu mil kvincent jaroj pli poste vizitis en la jaro 1904 Berlinon, li skribis kun miro al sia fratino Maŝa: „Ĉi tie dum la manĝado oni ne parolas“.

Kaj nun jam ni alpaŝas al la propra manĝado. Kiamaniere kaj per kio ni transportas glutpecetojn en la buŝon? Lerne fine manĝi per forko kaj tranĉilo“, ni dresas niajn infanojn. Kaj kial do? En la mondo oni manĝas diversmaniere, kaj ĉio estas nur afero de konvencio. Pri manĝilaro oni delonge disputas. Ĉi tiu temo povas gvidi al problemaj finoj. „Adeptoj de certa maniero de manĝo-enmetado en la buŝon, taksas la aliajn kiel necivilizitajn barbarojn“, skribas en

iu artikolo Brice Nelson. Kaj ni rigardu la mapon. Forkouzantoj superas en Eŭropo kaj en Norda Ameriko, uzantoj de manĝostangetoj ĉie en Malproksima

Oriento, kaj tiuj, kiuj kontentigas dum la manĝado kun siaj propraj fingroj, troviĝas preskaŭ en la tuta Afriko, parte en Bharato kaj en Indonezio. Tio signifas, ke ni forkouzantoj formas minoritaton. Kaj forkouzantoj estis minoritato ankaŭ en historio. Ankoraŭ



antaŭ tricent jaroj manĝis per la fingroj pliparto da Eŭropanoj. La forko estis opiniata kiel signo de dandismo kaj dekadenco, eĉ kiel lukso fiodoranta de diablo. Forkoj kaj manĝostangetoj ekŝatigis tial, ĉar ili plifaciligis manipuladojn kun varma manĝaĵo. Por la ĉina kulinara arto de pratempo estis karakteriza manĝopretigado po malgrandaj pecoj, kiujn oni metis en tasetojn kaj ne necesis forko nek tranĉilo. Tute sufiĉas manĝostangetoj. La forko liberigis al si vojon al eŭropaj tabloj je pluraj jarcentoj poste; ĝi ne estis akceptata tro kompleze. Ĝi estis uzata, sed nur kiel kuirilo. Meriton pri disvastigo de uzado de malgrandaj forkoj oni atribuis al Bizancanoj en la 10-a jarcento. La unuan ilustraĵon, kiu pruvas uzadon de forko dum la manĝado, ni trovas en iluminata manuskripto el itala monaĥejo de la jaro 1022. Fine ni trovas forkon ankaŭ ĉe kortegoj de eŭropaj regantoj; sed kronitaj kapoj anglaj kaj

francaj preferis proprajn fingrojn. Kaj ankoraŭ en la jaro 1897 estis malpermesite al maristoj de britaj militŝipoj uzadi dum la manĝo forkon kaj tranĉilon, ĉar oni opiniis, ke tio ne estas vireca kaj ke tio subfosas disciplinon. Ankaŭ kulero estis longe raraĵo. Nur iom post iom ĝi estis uzata. Komence ĝi estis rondforma el ligno ĉe malriĉuloj, el arĝento kaj oro ĉe riĉuloj, kaj ĝi estis tenata per ĉiuj kvin fingroj. Nur en la 17-a jarcento oni ekkomencis teni ĝin per tri fingroj.

Do, la preparoj estas finitaj - ni scias, kun kiu ni manĝos kaj ankaŭ necesa ilaro kuŝas antaŭ ni ĉe telero. Estus do inde komenci fine paroli pri manĝado kaj manĝaĵo, ĉu? - Tagmanĝon oni kutime komencas per supo. Kion pri ĝi? Marcus Tullius Cicero, ŝtatviro kaj verkisto, estis de tempo al tempo severa kritikanto pro disipado de romiaj patriocioj. Dum studa restado en Grekio li ellemis admiru simplecon de Spartanoj. Li skribis: „Ĉu vi ne konas manĝaĵon de Spartanoj dum la komunaj tagmanĝoj?“. Kiam tie tagmanĝis aŭtokrato Dionizio, li proklamis, ke tiu nigra supo, kiu estis la ĉefa manĝo, tute ne bongustis al li. La kuiristo de ĉi tiu manĝaĵo respondis: „Ne mirinde, ĉar mankis spico“. „Kia spico?“, demandis Dionizio. „Klopodo de ĉasado, ŝvito, kuro ĉe Eŭrota, malsato kaj soifo. Per ĉi tiuj ingrediencoj nome oni spicas spartanajn nutraĵojn“. Mi estas certa, eĉ ne unu el ni spirus pri tia spartana supo. Tamen ni scias, ke multaj el la nunaj supoj estas tre bongustaj, kaj fakuloj certigas nin, ke ili estas eĉ gravaj por nia sano.

Do, supon ni jam formanĝis kaj nun ni enrigardos telerojn de kelkaj famuloj.

Johano Brahms ne ŝatis paroli pri muziko dum la manĝado. Li dediĉis sin al ĝuoj, kiujn li rifuzis nomi nur ĝuoj de la korpo. Foje estis ĉi tiu fama komponisto invitita en nobelan domon por vespermanĝi. Oni prezentis tie kelkajn viandspecojn: kokidajon, porkaĵon, bovaĵon... Al Brahms tre bongustis. Kiel deserton proponis al li filino de la dommastro en sia propra prezento Betovenon, Mozarton kaj ankaŭ Brahmsen. Kiam ŝi finis, kuris ŝia patrino al Brahms kaj demandis ekscitite: „Majstro, kiu peco pleje plaĉis al vi?“ „Nepre tiu bovaĵo!“ sonis la respondo.

Nun ni iomete forŝovos kurtenon kaj enrigardos teleron de la fama reĝo Ludoviko la XIV-a. Li okupis 50 kuiristojn kaj historietojn pri lia apetito oni rakontadis larĝe-vaste. „Ofte mi vidis la reĝon tagmanĝi“, skribis dukino el Orleano, bofratino de la reĝo, „tio estis ekzemple: kvar teleroj da diversaj supoj, la tuta fazano, perdriko, plado da salato, ŝafaĵo je ajlo, du dikaj ŝinkotranĉaĵoj, pleto da buterbakajo, frukto, pudingo kaj jeleo. Krome ĉion ĉi li ne povis maĉi, konsiderante lian malbonan staton de la dentaro. En maljuneco li limigis sian tagmanĝon je taso da kolomba supo kaj tri rostitaj kokidoj - kio ja ne estis tiom malmulte. Oni malpermesis al li ĉampanan vinon kaj rekomendis burgundan. Kiel li povis ĉe tio ĝisvivi 77 jarojn - estas granda mistero.“

Riĉeco, brilego kaj kvalito de la tablo ĉe Ludoviko la XIV-a baldaŭ allogis atenton de la mondo kaj vekis ĝeneralan admiron. Ludoviko estas aŭtoro de signifa kaj jam alkitimiĝinta tradicio de la franca eksterlanda politiko: t. n. diplomatia gastronomio - al interkonsento pere de stomako. Ekz. dum la

traktado kun iu eksterlanda reprezentanto en pariza urbodomo januare 1687 estis prezentitaj 22 grandaj kaj 64 malgrandaj supoj, 21 specoj de ĉefa manĝaĵo, 44 diversspecaj rostaĵoj nur por ekfrando (dum dispecigo de meleagro ili interŝanĝis opiniojn pri demandoj, pri kiuj interesiĝis ambaŭ flankoj), 63 specoj de pluaj manĝoj, 36 salatoj, 12 saŭcoj. Tio ja estis diplomatio! Ĉe tia tablo ne povis esti alie, nur daŭri en longa, kora interparolo.



Nun ni revenu hejmen. Ĉeĥa kuirarto. Ĉiuj teoriuloj kaj kalorgardantoj malbenas ĝin, sed malgraŭ tio ĝi festas sukcesojn jam dum multaj jaroj. Tio komenciĝis en Bruselo, daŭris en Osako, Montrealo, Venkuvero. Helpis al tio

ankaŭ nia vazaro kaj vitro; tion prizorgis vitrofabrikoj Moser kaj Květná. En Bruselo aranĝo de tablo estis karakterizita per suprentiro kaj tutmondaj belartistoj ĝin transprenis. Kun entuziasmo estis akceptitaj ankaŭ niaj farunbuloj, kompreneble necesan farunon ni devis tien transporti de ĉi tie, la tiea ne enhavis ĝustan kvanton da gluteno. La plej sukcesaj manĝaĵoj? - Porkaĵo kun farunbulo kaj brasiko kaj lumbaĵo, kiu kompreneble portis majestan nomon: Steak Židlochovice. Entute ĉiuj manĝaĵoj estis nomitaj laŭ la ĉeĥaj kasteloj.

Terpomoj estas en pluraj regionoj de nia lando preskaŭ tiel ofta manĝaĵo kiel pano. Kaj kion mi legis pri ili? Komence ili ne havis la plej bonan renomon. Ili estis taksataj kiel ornama kreskaĵo. Sed, ĉu oni povus ilin manĝi? Manĝontoj evitis ilin per granda ĉirkaŭiro. Kiam fizikisto Thompson (inter nobelaro oni promociis lin al grafo Rumford) estis en servoj de bavara princo-elektisto, furiozis inter la loĝantaro mizero kaj malsato. Thompson pripensis, kiel eviti morton pro malsato. Li kunmetis recepton por malmultekosta satiga supo el flava pizo, terpomoj, grietoj kaj peco da lardo. Poste ĉi tiun supon oni publike kuiris kaj senpage disdonadis al malsatantoj. Povrujoj, al kiuj estis ĉi tiu agado adresata, fuĝadis, kvankam ili pro malsato preskaŭ estis mortantaj, ĉar iu perfidis al ili, ke ĉi tiu supo nomata rumforda, estis kuirita el terpomoj. La bonfara grafo ne ĝisvivis dankon, sed lia supo restas sur manĝokarto ĝis hodiaŭ.

Trinki aŭ ne trinki - estas la demando. Diversaj superstiĉoj rilate manĝaĵon ankoraŭ ekzistas. Unu el ili proklamas, ke ni ne trinku antaŭ manĝado,

ĉar onidire tio deprenas apetiton. Neprene. Precipe somere ni perdas multe da fluidaĵo kaj eksidas al manĝo sen apetito. Ĝi aperos ĝuste post la trinkado. La fluidaĵo plenigas stomakon, komencas ellasi fermentojn, la akvo rapide envenas en intestojn, kie ĝi tuj ensorbigaĝas. Sekve oni ne havas la stomakon akvoplenan, sed malplenan kaj sane ekscititan. Ankaŭ la trinkado dum la manĝado ne malutilas, kiel oni opiniis. Kontraŭe seka manĝaĵo devas esti post kelkaj buŝprenoj moligita per gluto da konvena trinkaĵo, kio plifaciligas laboron de la stomako kaj plibonigas ensorbadon. Malpli konvene estas manĝi sekan manĝaĵon sen tuja posttrinkado kaj nur je fino ĉion post-trinki per granda kvanto da fluidaĵo.

Nia plej ŝatata trinkaĵo estas kompreneble biero. Sed en multaj landoj oni ĝin uzas kiel ingrediencon ĉe kuirado: precipe dum la marinado, por surversado de rostaĵoj kaj kiel spicon. Germanoj ŝate kuiras kolbasojn en biero kaj ankaŭ kuiras bieran supon. Poloj fieras pro karpo laŭpole, preparata kun biero. Svedoj uzas bieron dum la panbakado, ktp. En Egiptio jam 2500 jaroj antaŭ Kristo oni kuiris kvar specojn de biero. Kaj tie estiĝis ankaŭ hieroglifa averto: „Neniam trinku bieron supermezure, vi falos kaj rompos ostojn, neniu donos al vi manon, viaj amikoj trinkos plu kaj diros: „Eljetu lin eksteren, tiun drinkulon“. Estu kiel ajn, sed la plejmulto certe konsentas kun la ĥoro el Vendita Fianĉino, kiu uzas la vortojn de Karel Sabina: „...tiu biereto estas ĉiela donaco...“

Aŭ ĉu ni preferus vinon? „Kiam venas vino, foriras racio“, asertas Talmudo. „Nur trinku, dum estas sufiĉe da tempo“, elradikas la rabenan saĝon

Aleksandro Puŝkin en Eŭgeno Onegin. Kaj ĉi tiun opinion apogas ankaŭ Charles Baudelaire en simila senco. Sed la antikva araba proverbo avertas: „Ne klopodu dronigi ĉagrenon en alkoholaĵo, ĝi naĝas“.

Do, ĉu ni enmanigu prefere kafon? En la nuntempaj populare sciencaj libroj ni povas legi: a) kafo tute ne malutilas sanon kaj du tasoj tage eĉ utilas al sano, b) kafo estas drogo kaj kiel tia malutilas sanon. Tion oni diris jam antaŭ ducent jaroj. Voltero, al kiu oni diris, ke kafo estas malrapida veneno, respondis: „Mi scias tion jam okdek jarojn, tiom da jaroj mi trinkas la kafon“. Araboj havas eĉ odajn je kafo: „Ho, kafo, vi forpelas trupojn da zorgoj, vi estas dia trinkaĵo, vi garantias forton al ĝiaj servistoj, kiuj sopiras pri saĝeco. Saĝa, kiu sorbas kafan ŝaŭmon, konas la veron, kafo estas trinkaĵo de diinfanoj kaj fonto de sano. Trinku ĝin kun fido kaj ne atentu parolon de malsaĝuloj, kiuj ĝin malbenas.“

Mi nur volas aldoni, ke en ĉio oni devas scii kaj praktiki la ĝustan mezuron.

Do, ni manĝis, ni trinkis kaj kio nun? Antaŭ nelonge mi legis, ke tre utilas, post tagmanĝo dudekminuta ripozo, kiu aldonas al ni pluajn fortojn kaj elanon por la plua laboro. Do, ek al la laboro!!

Fine mi ŝatus atentigi, ke mi ĉerpis el diversaj fontoj, precipe de Karel Sys kaj Vlastimil Pantůček, kaj mi ne prenas plenan respondecon por ĉio, kio estis ĉi tie dirite.

Brno, novembro 1994

Vortareto:

bankedado	stolování
postarado	postávání, stojačkování
mastiko	tmel
pilastro	pilíř
tripo	vnitřnost, drůbky
brultuŝi	ožehnout
konvencio	zvyklost
forkouzanto	uživatel
manĝetostangeto	vidličky
minoritato	jídelní tyčinka
dando	menšina
dandismo	hejsek
dekadenco	hejskovství
kulinara	úpadek
atribui	kuchařský přičítat, přisuzovat
manuskripto	rukopis
maristo	námořník
vireca	mužný
subfosi	podkopávat
ŝtatviro	státník
disipi	prohýřit
aŭtokrato	samovládce
spico	koření
ingredienco	přísada
kurteno	záclona, opona
larĝe-vaste	ŝiroko-daleko
fazano	bažant
plado	mísa
pleto	tác, podnos
kolombo	holub
por ekfrando	k zakousnutí
meleagro	krocán
saŭco	omáčka
malbeni	zlořečit
vazaro	nádobí
farunbulo	knedlík
gluteno	lepek (v mouce)
brasiko	zelí

lumbajo	svíčková
renomo	pověst
princo-elektisto	kurfiřt
pizo	hrách
lardo	slanina
perfidio	prozradit
superstiĉo	pověra
onidire, laŭdire	pry
nepre ne	rozhodně ne
stomako	žaludek
intesto	střevo
ensorbi	vstřebat
drinkulo	opilec
averti	varovat
dronigi	utopit
veneno	jed
sorbi	vstřebávat, sát
ŝaumo	pěna



Korespondi deziras:

Du infangrupoj (3-6 jaroj kaj 9-12 jaroj) deziras korespondi tutmonde pri tradiciaj ludoj, interŝanĝi tekstojn, desegnafojn kaj fotojn, por ekkoni kutimojn de aliaj infanoj malproksime de ilia hejmo. Adreso de la instruistino: Maryvonne Houvriez, 89 Rue du 3^o R.A.C., 36000 CHATEAUROUX, Francio

Asocia Esperanto-kalendaro 1995

Komence de la jaro ni kutime publikigas la asocian kalendaron - tio estas listo de esperantistaj aranĝaĵoj en la koncerna jaro. Ankaŭ nun ni ofertas al nia membraro, sed ankaŭ al ĉiu alia intereso diversajn renkontiĝojn, kiujn preparas sekcioj kaj kluboj de ĈEA kaj ankaŭ aliaj organizantoj en kunlaboro kun ĈEA. La kalendaro certe ne povas estis kompleta, ĉar en kelkaj lokoj oni preparas - ĉu regulaj, ĉu okazaj - diversajn renkontiĝojn de esperantistoj nur kun loka enhavo kaj signifo. Tiuj ne eniras nian kalendaron, sed pro tio ili ne estas malpli gravaj, male, ili ja prezentas veran esperantistan vivon de samideanoj en koncerna landoparto. Mi citu ekzemple ĉiumonatan Esperanto-kafejon kun jam kelkdekjara tradicio en Místek aŭ publikajn prelegojn en Třinec (Loĝante relative proksime de tiuj ĉi lokoj mi bone scias pri tiuj agadoj). Sed iliaj organizantoj ne atendas partoprenantojn el foraj lokoj de nia respubliko kaj bonvenigas ĉefe amikojn el ĉirkaŭaĵo.

La aranĝaĵoj en la kalendaro supozas vastan subtenon de esperantistoj kaj ĉeestantojn eĉ el eksterlando. Ili reprezentas nian movadon antaŭ ĝenerala publiko kaj kreas bazajn ŝtonojn en la bunta Esperantia mozaiko. Kompilante la kalendaron ni certe pri ĉiuj okazantaĵoj ne sciis. La sekvanta oferto enhavas nur tiujn, pri kiuj ni estis ĝustatempe informitaj pere de respondita demandilo, kiun ni ĉiuloken dissendis en decembro.

Januaro:

21. 1. Esperanto-balo en Ĉ. Třebová
 Informoj: C. Kotyzová, Drobného 1112,
 560 02 Ĉ. Třebová

Aprilo:

1. - 9. 4. Lingva seminario, Skokovy,
 penziono Esperanto, organizas AEH
 Informoj: Josef Vaněček, Soukenická 58,
 274 01 Slaný

**21. - 23. 4. Printempa renkontiĝo -
 Kunĉice pod Ondřejníkem**

Organizas Fervojojista sekcio de ĈEA
 Informoj: Jindřich Tomíšek, 751 18
 Říkovice 33

Majo:

**19. - 21. 5. Internacia renkontiĝo de
 naturamikoj - esperantistoj,**

Pláně pod Ještědem
 Organizas E-klubo Jablonec n/N.
 Informoj: M. Jíra, Mechová 8-32,
 466 04 Jablonec n/N

Julio:

**2. - 15. 7. Somera Esperanto-
 Tendaro, Lančov, I-a etapo**
 Informoj: Esperanto, 674 01 Třebíč

**8. - 15. 7. 48-a Kongreso de IKUE -
 Olomouc**

Organizas IKUE-sekcio de ĈEA
 Informoj: M. Šváček, Tršická 6,
 751 27 Penčice

**16. - 28. 7. Somera Esperanto-
 tendaro, Lančov, II-a etapo**
 Informoj: Esperanto, 674 01 Třebíč

**20. 7. - 1. 8. Karavano al 80-a UK en
 Tampere, Finnlando**

Informoj: Květa Hubnová, Osadní 2,
 170 00 Praha 7

**30. 7.-12. 8. Somera Esperanto-
 Tendaro, Lančov, III-a etapo**

Inf.: Esperanto, 674 01 Třebíč

Aŭgusto:

**25. - 27. 8. 29-a konferenco de
 Fervojojista sekcio de ĈEA, Ĉ. Třebová**
 Inf.: J. Tomíšek, 751 18 Říkovice 33

Septembro:

23. 9. 8-a Esperanto-tago, Pardubice
Inf.: Klub esperantistů dr. Schulhofa,
Na okrouhlíku 21, 530 03 Pardubice

29. 9. - 1. 10. 8-a Internacia kultura festivalo, Ústí nad Labem
Informoj: J. Kříž, Družstevní 411/11,
400 07 Ústí nad Labem

Oktobro: 14. - 19. 10. Internacia festivalo Filmo kaj video en Esperanto, Brno

Organizas: Kava-Pech
Informoj: Kava-Pech, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice

20. 10. - 22. 10. Konference de ĈEA, Brno
Inormoj: Věra Podhradská, Poříčí 1,
603 00 Brno

Decembro:

9.12. 12-a Ĉeĥa-Saksa Tago, ústí nad Labem
Inf.: Ing. J. Kříž, Družstevní 411/11,
400 07 Ústí nad Labem

29.12. Esperanta Silvestro, Ĉ. Třebová
Inf.: C. Kotyzová, Drobného 1112,
560 02 Česká Třebová

Ne tro riĉa, sed ankaŭ ne modesta - jen nia oferto por amikemaj esperantistoj. Certe vi trovos ion por kontentigi vin. Ni deziras agrablajn travivaĵojn en Esperantio!

V. Kočvara
prezidanto de ĈEA



EN POLLANDO
ANKORAŬ NE MORTIS E-POETOJ

Kazimjeŝ Ŝĉurek: AL PLURAJ FONTOJ, poezio. Tradukoj kaj originalaĵoj. Paĝoj 50. Antaŭparolo de Z. Glejcar. Formato 10 x 23. Eldonis Józef Golec, Sopot 1994, Pollando. Adreso por kontakti la aŭtoron: K.Szczurek, Str. Przepilinskiego 28, 43-400 Cieszyn, Polska.

Por iomete prezenti la aŭtoron al la publiko de Starto mi indikas katalogeton de liaj ĝis nun eldonitaj publikaĵoj. Nature, ke pli multas ankoraŭ ne publikigitaj pro kaŭzoj ekonomiaj.

K. Szczurek kaj Lina Gabrielli: **NUANCOJ** (1980), El la pola tradukita verko de Zofia Kossak: **Obseditaj de Dio**. Enkondukon verkis K. Szczurek (1989). Pri aŭtoro mem oni povas ekscii el publikaĵoj: **Homoj, verkoj, ideoj** (1990), **Penetre tra jarcentoj** (1991).

* Libro enhavas interesan antaŭparolon de Z. Glejcar pri la forma evoluo de la poezio ekde strikte ligita poetiko ĝis poetiko absolute libervola kaj eĉ anarkia. K. Szczurek apartenas al multflanke orientitaj aŭtoroj: li scias uzi ne nur modernan, sed ankaŭ tradician tipon de la poezio, li ne nur verkas, sed tradukas kaj ĉefe kapablas tradukadi en E-o originale verkintajn aŭtorojn naci-lingven. Vidu specimenojn de la poemoj far M. Boulton, Eli Urbanová kaj aliaj, tradukitajn en la polan lingvon.

Permesu al mi citi el Sapiro al puraj fontoj: *...en hat', mizero kaj militoj dolorĝemo, ĝua heno, / amasbuĉado de nenaskitoj, karcer', torturo kaj kateno / sopiras mi al puraj fontoj.*

Aŭtoro do bone scias pri negatifaĵoj sed ne rezignas kaj admonas nin ne perdi

vojon kaj en mondo malĉasta resti ĉasta. Tiu ĉi starpunkto estas en nuna mondo kiu plenas de kruelaĵoj, krimoj, militoj, priŝtelado, ekologia malsano kaj malpuro tre grava kaj valora. La titolo certagrade estas respondo al lirika libro de Eli Urbanová: El subaj fontoj. Interese kompari kiel du poetoj - ĉeĥa virino kaj pola viro - vidas la mondon.

Mi verkis pli longan recenzon, sed bedaŭrinde mankas spaco por publikigitaĵoj, do mi devas ellasi interesajn citaĵojn kaj paroli rekte pri opinioj. La aŭtoron interesas problemoj de la poetiko. Ni citu nur kelke da ekzemploj. Tradukante Gete-on: *Kie aŭdiĝas kanti, bonvolu halti. / Malbonaj homoj ne kutimas kanti.*

Alia: *Mi ĉasas la fuĝeman senton / ne ke la mond' strange mienu / sed por korpigi la momenton / kaj jen vi, frato, min komprenu. / ... Serenu kiel amrigardo / kaj simplu kiel la manpremo.* / Traduko de L.Staff-versoj.

K Szczurek ne apartenas al poetoj, kiuj ludas sur unu violonkordo. Li scias vidi mondon tragike (*mi iras kvazaŭ drone en sufero*), li scias vidi la mondon pozitiv-preskaŭ humure, ŝerce, ludeme, facilanime - sed ĉiam superas la tonon de analiza meditemo - (*Kiam nin invadas deprimo kaj teda splen', / kiam pro grumblemo acidas nia mien' /, kiam ni ekdubas pri l' vero kaj pri la bon' /, la savon alportos sincera kantason*).

Por li ne estas la naturo kaj naturliriko afero de nur unu jarsezono, ne, li vidas naturon printempe, somere, aŭtune kaj antaŭ vintre. Aŭtuna tono: *Silent' aŭtuna. Birdoj ne plu kantas /, l' naturo plenas je melankoli' / kaj min, solecan, penso trista hantas: /nu, baldaŭ estos temp' ankaŭ por vi.*

Se K. Szczurek parolas pri la vivo, neniam li reduktas ĝin al unu vivperiodo. Ĉiam li vidas vivon en naskiĝo, infaneco, juneco, matureco, maljuneco kaj en morto, do kiel la tuton.

Vere plaĉas al mi, kiel la aŭtoro scias manipuli per la rimoj. Rimo estas ĉe li natura parto de la poemo kaj ne nur la ornamaĵo, do li ne estas kiel multaj nur rimistoj, kiuj rimas substantivon en la sama kazo kaj formo (bono-fono, estifesti ktp.), sed li estas inventema (*Vivu Pan', kiu per flut' kana / paŝtiston brunan akompanas*) simplan adjektivon li rimas tiel: *Kaj kiel meva aro zuma / kun flugilaro blankenpluma / dua verso uzas pli longan vorton /.* Tiuj ĉi manipuloj kun rimo faras lingvon multsonan, eligas la monotonion.

Ĉefe mi laŭdas aŭtoron, ke li serĉas vor-tojn tiel, ke ili komplementu sin, ke ili ne protestu kontraŭ si, ke li preskaŭ amu sin, muziku, belsonu. Pro tio liaj versoj ne stumblas, ne grumblas, ili fluas, kantas kaj mi kredas, ke pro tio ofte uzis ilin konata recitantino kaj aktorino Jadwiga Giebczynska en siaj programoj. Ankaŭ kantebleco de la versoj estas ilia granda pozitivo.

Nur iomete kaj ne nur iomete min ĝenas troiga uzo de elizioj. Vere tio faras nian lingvon aspektstranga, kion diras ne nur mi, sed seriozaj kritikantoj de Esperanto. Tiu multeco (mi parolas nur pri SUPERkvanto!) komplikas la recitadon. Kaj mi dirus provokan ideon: Esperanto-tekston ni legas kiel tuton kaj ĉu mi ne komprenas tute, se la poeto dirus: *Kaj apud lit' orgojle staras / l' amorantino de l' mortanto / ktp.* Entute kompreneble kaj problemoj por presisto kaj por kritikistoj forfalas. Tro revolucie? Sed kial ne?

Mi laudas ankaŭ tion, ke variaj poemoj estas strukture kaj konstrue variaj. Krom alparoloj kaj priskribo li scias uzi alvokojn de la aĵoj, plantoj, homoj, li uzas ankaŭ dialogon, kie parolas variaj voĉoj kaj personoj kaj mi konas ankaŭ poemojn, kiuj estas malgrandaj rakontetoj kun certa agado. Enuiga estas la poezio, kie mankas monologo, kie la poemo ne estas respondo al certa problemo ktp. Tiuj variaj formoj vere vigligas poezion kaj produktas ĝojon de la pretendema leganto. Kaj eblo verki tiel multforme kaj multnivele kaj multhorizonte kaj multviolonkorde alportas siajn fruktojn kaze ni volas prezenti nian originale verkantan en Esperanto al neesperantista publiko enkadre de la nacia literaturo.

Michael Jackson kaj Esperanto?

Laŭ raportoj, kiuj aperis en pluraj britaj ĵurnaloj kaj en radioelsendoj dum novembro, la fama usona pop-kantisto Michael Jackson uzis Esperanton en nova videobendo kun kompilaĵo de kantoj. Laŭdire Jackson rolas en la video kiel savanto de neprecizigita orienteŭropa mondo-parto, el kiu li forpuŝis la Ruĝan Armeon. Lin akompanas en triumfa defilado tra liberigita urbo grupo da pabatalantoj, kiuj portas la verdan stelon. Bedaŭrinde ni ne scias, ĉu la videobendo efektive aperis en decembro 1994, ĉu li ankaŭ kantas esperantlingve aŭ ĉu la verda stelo estas sola esperantaĵo en la video. Laŭdire infanoj en la filmo kantas esperantlingve: „Mi amas vin, Michael Jackson“. La filmeto estis farita dum 10 tagoj en Budapeŝto.

(laŭ „La Brita Esperantisto“)

Esperanta Silvestro

La 28-an de decembro 1994 realiĝis en Ĉeská Třebová Esperanta Silvestro. Ĉeestis ĉirkaŭ 80 personoj el la tuta Ĉeĥio, eĉ el Slovakio kaj unu samideano el Italujo.

Mi kaj Maruška bonvenigis la ĉeestantojn per tosto. Amuzan vesperon komencis Jiří Pištora. Kvar muzikistoj ludis al danco. S-ano Josef Vaněček, prezidanto de Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, parolis pri ekspozicio de neprofitaj organizoj. Ĝi realiĝis de la 1-a ĝis la 3-a de decembro en Prago kaj estis tie ankaŭ stando de Esperanto.

E-Silvestron ĉeestis ankaŭ neesperantistoj; estis bone, ke ili aŭdis pri Esperanto. La partoprenantoj konkursis serĉante kantojn laŭ donita temo kaj kantante ilin, poste „ĵurio“ klopodis trovi la plej interesan ornaman floron (laŭ invitilo ĉiu devis havi floran): venkis viro kun rozkoloraj floretoj en riĉa barbo, duan lokon okupis sinjoro kun karnovora floro farita laŭ la ĉeĥa filmo „Adela ankoraŭ ne vespermanĝis“ kaj tria estis mi kun granda leontodo ĉapele sidanta sur mia kapo. Kvaraloke, kvankam sen premio, restis du junuloj, kiuj pentris florojn rekte sur siajn vangojn.

Noktomeze samideanoj, kiuj aktoris reprezentantojn de la kvin kontinentoj (Azio - japanino, Afriko - nigrolino, Aŭstralio - agrikulturisto, Eŭropo - skoto, Ameriko - indiano), adiaŭis la malnovan jaron kaj bonvenigis la novan. Poste ĉiuj ricevis ŝercan donaceton.

Estonta Esperanto-Silvestro estas planita por la 29-a de decembro 1995.

Zdenka Novotná

Trilanda Praga renkontiĝo de IKUE-anoj

En la tagoj de la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 1994 okazis en Praha 4 - Kunratice en Dioceza centro de junularo Nazaret planita renkontiĝo de IKUE-anoj el Pollando, Germanio kaj Ĉeĥio. La plej grava tago estis sabato, la 8-a de oktobro, kiam oni informis pri la 48-a IKUE-kongreso julie 1995 en Olomouc, preĝis la Zamenhofan „Preĝo sub verda standardo“, prezentis videon de s-ano L. Mlejnek el Konferenco pri Amo, Vivo, Familio 1992 en la kanada Otavo kaj ĉefe - la renkontiĝo kulminis per Sankta Meso celebrata de ĉefepiskopo Miloslav Vlk kaj kuncelebrata de pola gastu sac. Karol Mozor el Skočovo. La ĉefepiskopo plifruigis sian revenon el sinodo en Romo, kie li fariĝis kardinalo, por okazigi la promesitan mescelebron, spite laciĝon pro troa laborstreĉiteco.

Post bonvenigaj salutvortoj alparolis la ĉefepiskopo esperantlingve la kvindekda ĉeestantaj esperantistoj per jenaj vortoj:

„Karegaj, elkore mi vin ĉiujn salutas kaj bonvenigas. Ĉi tiu renkonto revenigas min en tempon de junaĝo, kiam mi povis regule renkontadi tiamajn esperantistojn en České Budějovice aŭ pli poste en Prago en strato Římská. La ideo de interkompreno ne nur lingva, sed ideo de unueco kaj ia aparteno ĉiam min altiradis ankaŭ kiel kredantan homon, do ĝi eniĝis en mian episkopan devizon: 'Por ke ĉiuj estu unu'. Kiam esperantistoj celebras eŭĥariston, certe ili sentas, ke ĉi tie diece plenumitas ideo de la unueco kaj komuneco de la homa familio. La Krista ofero estas

por ni konkreta modelo de ekzistanta interkompreno. En ĉi tiu modelo ni enradikigu niajn klopodojn pri interkompreno. Ni malfermu niajn korojn por Dio kaj por ni reciproke, por ke ni estu kapablaj por reciproka interkompreno. Ni bedaŭru niajn pekojn.“

Sekvis la homilio, familiara prediko, kiam la kardinalo diris:

„Karegaj!

Ofte, kiam mi staras antaŭ iu internacia publiko, kiu parolas diversajn lingvojn, mi pensas pri Babilono. Tiamaj homoj antaŭe parolis per komprenebla lingvo, do ili komprenis sin reciproke, sed ili deturnis sin de Dio kaj iris propran vojon kaj tio estis komenco de ilia malinterkompreniĝo. Komenco de tio havis fakte radikojn jam en paradizo, ĉar tie la homo volis esti kiel Dio kaj li ĉesis kredi je Dia amo. Kaj la samo ripetigis en certa konkreta socia formo en Babilono, kie oni volis konstrui monumenton de sia propra potenco. Kaj tio estis komenco de ilia malinterkompreniĝo. Loĝantoj de Babilono ne nur deturnis sin de Dio, sed ili komencis dispartiigi sin. Kaj poste ju pli ĉi dividiteco de la homoj grandiĝis kaj profundigis, des pli ili malproksimigadis sin for de Dio. Kaj en hodiaŭa evangelio ni legis pri komenco en la ŝanĝo de ĉi tiu bedaŭrinda evoluo. Dio mem venis, por ke Li proksimigu sin al homoj, por ke Li proksimigu ilin al Si kaj por la reciproka ilia alproksimiĝo. Kaj ni observu, per kio ĉi tiu resanigo de la vundo de dividiteco kaj deturno de Dio kaj ankaŭ disigeco inter la homoj komenĉiĝis. Tie estas dirite: 'La Sankta Spirito venos sur vin kaj la ĉiopova Dio

superombros vin.' Do la komenco de resanigo de ĉiu dividiteco estas la Sankta Spirito en la Spirito de Amo. Ĉi tie estas esperantistoj, kiuj klopodas kaj strebas pri reciproka proksimiĝo, per forigo de lingvaj baroj inter la homoj. Estas ĉi tie katolikaj esperantistoj, kiuj scias, ke krom forigo de la lingvaj baroj estas necesa ankoraŭ io plia. Mi rememoras, ke antaŭ 40 jaroj mi estis membro de junulara Esperanto-klubo, ni nin titolis 'samideanoj'. Samideano signifas, ke temas pri homo havanta la saman penson, la saman ideon. Esperantistoj ne nur intencas kaj strebas venki lingvajn barojn, sed ili klopodas proksimigi homojn, por ke ili havu la saman ideon de reciproka interkompreno kaj reciproka malfermiteco. Ĉi tiu klopodo estas nuntempe treege grava tial, ĉar en la mondo ekzistas grandega malriĉeco de interrilatoj. Mi intence diris la vorton 'malriĉeco', ĉar ekzistas multe da malriĉeco ne nur materiala, sed ankoraŭ pli da malriĉeco pro manko de interrilatoj. Kaj ĉi tiu malriĉeco en interrilatoj estas kurac-ebla nur per Sankta Spirito kaj per la amo. Kaj la katolikaj esperantistoj havas la avantaĝon, ĉar ili posedas ne nur la ideon de la lingvo, sed ili havas samtempe ankaŭ ideon de Kristo kaj la Sankta Spirito.

Ni do kune dankos kaj vi speciala volas per ĉi Di-servo esprimi dankojn al Dio por ĉiuj donacoj. Mi deziras, ke ni komune ankaŭ petu la Sanktan Spiriton, ke vi ĉiam sukcesu la lingvan klopodadon plenigi per potenco de la Sankta Spirito. Amen."

(laŭ „Dio Benu“)

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature Josef Kavka

(2-a parto)

-EN- kaj -IN-

Kiel duan problemon tipan por la leksiko de Esperanto, ni esploru koincidon de la radikfina -IN- kun la sufiksa -IN-. La situacio aspektas tre simile al -OL- kaj -UL- (v. la unuan parton de nia traktaĵo en STARTO, 1994, 4, 20-21).

Timo antaŭ ebla homonimeco igis la kreinton de Esperanto al misformado de internaciaj nomenklaturaĵoj, ĉi-okaze per la radikfina -EN-.

Jen 11 **fundamentaj** vortoj (enkrampe iliaj latinaj ekvivalentoj): azeno (*asinus*), delfeno (*Delphinus*), ermeno (*erminea*), frakseno (*Fraxinus*), jasmeno (*Jasminum*), karpino (*Carpinus*), plateno (*Platinum*), rosmareno (*Rosmarinus*), rubeno (*rubinus*), sukceso (*sucinus*), tendeno (*tendo*, genitive: *tendinis*). Aldoniĝas gelateno: la partecipo *gelatus* (= frostiĝinta) de la latina verbo *gelare* kondukas al la franca *gélatine* kaj la angla *gelatine*. Se ne temus pri fundamentaĵo, sendube oni asertus, ke por Esperanto pli konvena formo estus „ĝelatino“ (kp. la kaloĉajan: ĝelo).

Revenante al la ĵus elnombrita dekunuo, apenaŭ ni trovus danĝeron de konfuzo pro homonimeco, se la vortoj havus -IN- anstataŭ -EN-: „azino, delfino, ermineo, fraksino, jasmino“; la foliarbo „karpino“ certe ne konfuziĝus kun la fiŝfemalo, „platino“ kun la presmaŝina tabulo, „rosmarino“ kun la fundamenta bestonoma femalo, „rubino“ kun

forĵetindaĵoj; „sukcino“ devus cedi al la kodigita mineralnomo: sukcinito; „tendino“ pli bone koherus kun la malsano, latine nomita *tendinitis*, ĉar en tiu lingvo radikoj genitivaj pli produktivas ol nominativaj.

Ne mirinde, ke la franceska PIV volonte sankciis la -EN-procedon, kiel ni povas konstati okaze de jenaj 8 vortoj: bukveno (*Buccinum*), fokseno (*Phoxinus*), kareno (*carina*), meleagreno (*Meleagrina*), muskardeno (*Muscardinus*), pingveno (*Pinguinus*), poleno (*pollen*, genitive: *pollinis*), skvateno (*Squatina*). Povus aldoniĝi astateno (*Astatium*), sed ties latina ekvivalento ne konsistas el -IN-; male, la PIVa formo cedas ĉe hemiistoj favore al „astat(i)o“; karoseno ne estas apogata de internacia uzo etnolingva, ekz. *de*: Kerosin, *en*: Kerosine; oliveno nepre spitas la kodigitan mineralnomon, ekz. *de*: Olivin, *en+fr*: olivine, *sp*: olivina k.t.p.; krome, oliveno povus kaŭzi konfuzon kun alia mineralo; olivenito. Aparte oni emfazu la fortimigan nomon Sahaleno, dun ne sole la fontlingva, sed ankaŭ la internacia formo estas Sahalino (POŜ-ATLASO DE LA MONDO, 1970). Tiaspeca perfortadon de geografia nomenklaturado oni devas forte kontraŭbatali!

Malfacile oni komprenas la strangan tendencon al misformado, se tute ne aŭ apenaŭ ekzistas konfuz-danĝero pro homonimeco. Unusola okazo tiaspeca en zoologio povus aperi ĉe „meleagrino“, t.e. la marmolusko kaj meleagrino, femalo de la kortbirdo. (Al tio eblas rimarkigi, ke eĉ la internacia kodigita zoologia nomenklaturado greklatina allasas homonimon, se temas ekz. pri malsamaj klasoj.) Tiom malpli ĝenus „karino“ kiel florparto kaj karino kiel skeletparto de

birdo. Ja mem kareno laŭ PIV havas 4 diversajn signifojn. Ĉu do la 5-a jam ĝenus?

Kuriozan solvon - muskardeno por la gliro kaj muskardino por la malsano kaŭzata de fungoj - liveras PIV. Tamen pli natura solvo estus „muskardino“ por la gliro kaj „muskardinozo“ por la infektomalsano.

Interesa estas poleno (*de*: *Pollen*, *en*: *pollen*, *fr*: *pollen*, *it*: *polline*), ĉar, kiel jam supre dirite, produktivaj formoj estas tiuj kun -I-, ekz. *en*: *pollinate*, *fr*: *polliniser*, *pollinisation*, *pollinique*, *it*: *pollinico*. Por kompletigi, palino-analizo, -grafio, -ologio, -skopio k.t.p. devenas de la helena verbo *palino* = mi ŝutas (farunon).

Aliflanke oni zorge distingu: Ne ĉiuj nomenklaturaj PIVaĵoj kun -EN- estas misformitaj. Ekz. la „marporko“ apartenanta al cetacoj, nome foceno (*Phocaena*) estas esperantigita tute bonorde. Okaze de akeno ne estus prave riproĉi pro la -EN-, sed pli eble pro la -K-, ĉar la latina nomo de la seka frukto estas: *achenium*, do plej trafe: ahenio.

En PIV-Suplemento ni ne trovis nomon (ĉu komunuzan, ĉu propran), kiuj estis misformita per -EN-.

Sed jen ni turmu atenton al la 12 **fundamentaĵoj** kun -IN-: difini (*definire*), ilumini (*illuminare*), inklina (*inclinatus*), karmino (*carminium*), kombini (*combinare*), maŝino (*machina*), muslino (*it*: *mussolino*), obstina (*obstinatus*) rafini (*fr*: *raffiner*), rezino (*resina*), ruino (*ruina*), urini (*urinari*). Aldonendaj estas du propraj nomoj Berlino kaj Kalvino, kiuj povas servi kiel bonaj malekzemploj por la kripla PIVaĵo „Sahaleno“ (v. pli supre).

Prave, Zamenhof ne timis konfuzon

inter kombin-o kaj komb-ino, maŝin-o kaj maŝ-ino, urin-o kaj ur-ino.

Da **oficialaj** radikoj kun -IN- estas multe pli (35): abstini (*abstinere*), albino (*albinus*), angino (*angina*), anilino (*anilinum*), balzamino (*balsamina*), benzino (laŭ la tropika planto *Styrax benzoin*), destini (*destinare*), determini (*determinare*), disciplino (*disciplina*), doktrino (*doctrina*), galantino (fr: *galantine*, kp. kun *gêlatine*), gilotino (laŭ la franca kuracisto *Guillotin*), glicerino (fr: *glycérine*), kinino (fr: *quinine*), kumino (*cuminum*), margarino (fr: *margarine*), marini (*marinus*, fr: *mariner*), medicino (*medicina*), morfino (*morphinum*), naftalino (*naphtalinum*), nikotino (fr: *nicotine*, laŭ la franco *Nicot*), origino (*origo*, gen. *originis*), parafino (*par-um affinis*), pelerino (fr: *pêlerine*), pepsino (*pepsinum*), retino (*retina*), ricino (*Ricinus*), rutino (fr: *routine*), stearino (fr: *stéarine*), striktino (*strychninum*), tamburino (fr: *tambourin*), tanino (fr: *tanin*), turbino (*turbineus*), vakcino (*vaccina*), vazelino (*vaselina*).

Estas laŭdirinde, ke ties oficialigo okazis sen timi konfuzon kun la sufiksa -IN-. Tiom malpli komprenebla estas ekz. la pli supre menciita keroseno, kompare kun la hemiaj nomenklaturaĵoj: anilino, benzino, glicerino, kinino, margarino, morfino, naftalino, nikotino, parafino, pepsino, stearino, vazelino. La iom ekzakte pensantaj hemiistoj strabe rigardas a senmotive arbitran baraktadon inter I kaj E. (Parenteze ni menciuj, ke kinino estas difinenda kiel kreskohormono, dum ĥinino nature devus esti la drogo antifebra, ekstraktata el la ŝelo de cinĥono.)

Okulfrapa homonimeco generiĝas per la vorto **rutino**. Apud la nocio de

PIV (lerto, kutimo), oni devas akcepti tiun de la flavonoida glikozido entenata en la planto ruto (*Ruta graveolens*). La ceteraj homonim-okazoj (ekz. marin-o kaj mar-ino, parafin-o kaj paraf-ino, retin-o kaj ret-ino, turbin-o kaj turb-ino) estas ja tute neglekteblaj.

Da **neoficialaj** PIVaĵoj kun -IN- estas tro multe (kelkcent), por ke ni povu elnombri ilin ĉi tie. Inter ili ni trovas multajn dekojn da hemiaĵoj. Ni menciuj almenaŭ la plantsukan **pektinon**, disde kiu prave distingiĝas la molusko **pekteno** (*Pecten*). Ĉi-okaze, PIV profitis, ne difektinte la originalajn formojn.

Enkadre de la mineraloj (akvamarino, aventurino, kalamino, silvino kaj turmalino) neniel minacas homonimeco. Sed ekzistas ankaŭ mineralo **nikelino** (NiAs), homonima kun la kupra-nikela-zinka alojo; tiun ĉi PIV jes registras kaj difinas.

El la plantoj antirino, karlino kaj lupino, sole la lasta homonimas kun lupino.

Restas konkludi, ke la granda nombro de la neoficialaj PIVaĵoj kun -IN- liveras konvinkivan argumenton, por ke aŭtoroj de specialaj vortaroj (ekz. hemiaj, mineralogiaj, botanikaj, zoologiaj, geografiaj) definitive rezignu pri misformado de la radikfina -IN- per -EN-.

Ke nia konkludo estas ĝusta, povas servi ekzemplo de mineralogia vortaro (*T.A. Hoeg*, 1988). La vortaro registras 24 mineralnomojn kun -IN-: alabandino, almandino, andezino, askrof-tino, bertierino, eŭĥlorino, glucino, guanino, ĝismondino, hauino, humbold-tino, iridosmino, kormerupino, kuspido, levino, mikroklinino, nikelino, olivino, ruterfordino, safirino, serpentino (homo-

nima kun serpent-ino), spesartino, steenstrupino, turmalino. Aliflanke, ĝi registras unusolan nomon, kies originalo estas misformita per -EN-: plateno. Ĉi-okaze ĝi referencas al la fundamentaĵo en PIV.

Ĉu povas ekzisti pli bona pruvo, ke la iama misforma tendenco ne plu estas perspektiva?

Fontoj

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio Tutmonda. *Paris*.

Mineralnavn (*no, eo, en*). T.A. Hoeg (1988). - *Universitetsbiblioteket i Oslo, Skrifter: 15*.

Inversa Vortaro de Esperanto (1989). B. Pabst. - Esperanto-Centro, Paderborno.

Prago 9. 12. 1994

La legantoj bonvolu korekti

En la traktaĵo de J. Kavka (STARTO, 1994, 4, 20-21) generiĝis - pro la retajpo - jenaj eraroj:

Primulus: Primula; **spektas:** aspektas; **post (= granulo 2) kompletigu:** kapolo (capula); **ocula:** oculus; **konvovulvo:** konvolvulo; **Convuvulvus:** Convolvulus; **postulo:** pustulo; **postula:** pustula; **Lizula:** Luzula; **mimulus:** Mimulus.

La redakcio petas pardonon.

2a ESPERANTO EŬROP-UNIA KONGRESO okazos en Parizo (2-6 junio 1995) kun kongresa temo: „Nia Eŭropo, ĉu landaj asocioj havu komunan varbadagadon?“ Informoj: Esperanto-France, bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio

KAVA-PECH Kalendaro

Simpozio Entreprenado pere de Esperanto, Dobřichovice apud Prago, 1995-05-10/14

Itinero laŭ la brava soldato Ŝvejk, Prago-Putim-České Budějovice, 1995-05-14/20

Flugkaravano al Japana Esperanto-Kongreso, Praha-Tokio (ekskurso al Fuji-monto)-Jokohama-Praha, 1995-10-07/17

Festivalo de Filmo kaj Video en Esperanto, Brno, 1995-10-20/23

Turismaj perloj de suda Moravio, steldirekte de Brno, 1995-10-23/26

Bonvenigo de Nova Jaro en Prago, 1995-12-29/1966-01-04

Pli da informoj kaj aligilojn bv. postuli de KAVA-PECH, Eduka Entrepreno de Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, tel/fakso: x42.2.9912126

Orbis Pictus

Muzeo de bildkartoj - Svitavy
Květuše Veselá, Bezručova 24,
568 02 Svitavy

Temo de ekspozicioj por la jaro 1995: ĝis 15. 1. : Kristnasko kaj Novjaro sur bildkartoj

17. 1. - 28. 2.: Ĉeĥaj emblemoj kaj signoj sur bildkartoj

1. 3. - 16. 4.: Esperanto kaj la mondo

18. 4. - 28. 5.: Virino - eterna inspirado

30. 5. - 2. 7.: Pentristoj por infanoj

4. 7. - 10. 9.: Ekkonu vian patrujon (1890 - 1995)

12. 9. - 29. 10.: Vivu la ĉaso!

31. 10. - 10. 12.: Niaj aktoroj kaj kantistoj (portretoj kaj aŭtogramoj)

12. 12. - 14. 1. 96: Kristnasko kaj Novjaro sur bildkartoj kaj PF

UK Seulo laŭ S. Milojevič

La direktoro de UEA, Simo Milojevič, komunikis al J. Mařík el Seulo: „Ni spertis belan kaj aparte sukcesan kongreson ĉi tie, pli universalan ol kutime, ĉar eŭropanoj minoritatis inter 1774 aliĝintoj. - Ni nun definitive decidis, ke la UK en 1996 venu viziti vin en Prago“.

- Jen defio por la ĉeĥaj esperantistoj, ke la UK en Prago minimume same sukcesu!

Sur la sendita karto estas ĉeokaza E-poŝtmarko, kun verda stelo kaj vortoj „Seulo 1994“. Ĉu la ĉeĥa poŝto agos laŭe?

Alia poŝtkarto el Seulo, el la plumo de la ĈEA-prezidanto V. Kovara, surhavas kolorajn fotokopiojn de E-poŝtmarkoj de 6 landoj, al kiuj „tronas“ la belaj pm 5 Kĉs „Ĉeĥoslovakenio“ kun subteksto en E: „Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj - Praga 1968“.

(jm)

Organizátorům UK 1996

Dovoluji si Vám poslat kopii svého dopisu Paláci Žofin v Praze, kde se v r. 1921 konal XIII. UK. Jsem si vědom, že ne každý má svého E. Privata „Historio de la lingvo Esperanto“ (1927, Leipzig). Proto opisují zde líčení dr. Privata o UK v Praze, abychom si oživilí, za jakých pozoruhodných okolností ke sjezdu došlo a ostatní kolem sjezdu. Dnes si asi nedovedeme představit, že by se dalo něco jako tehdy (vyzdobení stanic na cestě ku Praze, služba esperantistů na hranicích atd.) Myslím, že organizátoři by měli znát okolnosti Universala Kongreso 1921. - Uvítali bychom, kdyby alespoň něco z UK 1921 se uskutečnilo i v UK 1996.

Dr. Privat: (s. 103-104 Historio, II. díl): D-ro E. Beneš tie (t. e. dum solena vespermanĝo) kaj per publika letero deklaris: „Mi certigas vin, ke ideon pri Esperanto mi ĉiufoje subtenos.“ Ankaŭ d-ro Nitobé laŭdis la „Internan Ideon“ de la movado, tiom necesan por rekonstrui pacan homaron.

Tuta Mezeŭropo tiun ĉi fojon aŭdis pri Esperanto dum la somero; ĉar vojaĝis ne nur la kongresanoj, sed iliaj familianoj kaj miloj da ceteraj partoprenantoj de antaŭfestoj aŭ postaj kunvenoj en Berlin, Dresden, Wien, Budapeŝto, Graz, Trento, Reichenberg. Urbojn kaj staciojn trapasis *dekoj da internaciaj karavanoj* ~ parolante Esperanton. Neniame antaŭe la sono de la lingvo tiom aŭdiĝis en stratoj, en stacidomoj, en vagonoj. *Ĉie pendis flagoj*, ĉie brilis steletoj. Ĉe la landlimoj sindone deforis UEA-delegitoj kun verda brakbando. Eĉ fervojistoj respondis en Esperanto.

En multaj vilaĝoj ĉeĥoslovakaj, hungaraj, aŭstriaĵaj amasiĝis lokaj anaroj por bonvenigi eksterlandanojn. Sub somera suno flamis ruĝaj ŝaloj de kamaradinoj, flue babilantaj en lingvo Zamenhofa. Oni demandis, oni rakontadis, oni kantis la himnon, oni svingis salutojn al pasantaj vagonaroj. Kia bela paca revanĝo je la siraj forveturoj de soldatoj dum la milito! Interfratiĝo redonis al koroj esperon kaj ĝojon. Venos pli bonaj tempoj. „Iam la homoj ĉesos esti lupoj unu kontraŭ aliaj,“ profetis Zamenhof.

En ĉiuj gazetoj de Centro-Eŭropo aperis artikoloj mirantaj pri la granda nombro da esperantistoj. **La impresoj estis vere forta** kaj neatendita. Esperanto retrovis vivantan popolon.

En Praha estis decidite, ke la organiza

komisiono devos aŭdi la kritikojn aŭ proponojn pri la plano kaj publikigi detalan tekston de statuto en Aprilo 1922, por ke ĉiuj esperantistoj havu la tempon fari al si opinion antaŭ la sekvanta kongreso.

...Fine longa diskuto okazis pri enkonduko de Esperanto en lemejoj kaj plej bonaj rimedoj ĝin akceli.

Dum la tuta kongreso en Praha regis **neordinara entuziasmo kaj optimismo**. Oni ja sentis, ke la tuta movado efektive revekigis kaj revenis sian marŝadon antaŭen. La nova postmilita periodo brile malfermiĝis.

J. Mařík

V Praze dne 8. října 1994

Palác Žofín

pan Jan Nekola

Slovanský ostrov

110 00 Praha 1

Vážený pane Nekole, provozovateli „Žofína“!

Rád jsem uvítal znovuotevření „Žofína“. Byl jsem se tam podívat hned v ten den večer, a mohl obdivovat ve slavnostním osvětlení jeho imponující zjev, i s úpravou parku s osvětlenou naší paní Boženou Němcovou.

Nevím, zda víte, co všechno se v historii této budovy v ní událo. Já se Vám chci zmínit o jednom bodu, a to o světovém sjezdu v této budově: v r. 1921 se u vás konal pod záštitou československé vlády XIII. světový kongres esperanta (Universala Esperanto-Kongreso) za účasti více než 2000 adeptů z 35 zemí.

Historik Edmond Privat (Švýc.) připomíná ve své „Historio de la lingvo

Esperanto“, že pražský kongres se stal velkolepou manifestací pokroku esperanta. Zúčastnil se m.j. dr. Inazc Nitobé jako delegát Společnosti národů v Ženevě a své delegáty poslaly Mezinárodní úřad práce a Mezinárodní Červený kříž. Deset vlád se zúčastnilo svými zástupci.

Sjezd zahájil vládní delegát, ministr školství a národní osvěty dr. Šusta, a ministr zahraničí dr. E. Beneš se zúčastnil slavnostní večeře výboru Světového esperantského svazu (Universala Esperanto-Asocio, Ženeva) pro oficiální představitele. -- Během sjezdu byl ve zvláštní schůzi založen Beznárodnostní světový svaz Sennacieca Asocio Tutmonda, SAT).

Světový kongres SAT-u se letos konal ve Strážnici a předkongres v Praze, takže jeho účastníci viděli i „rodiště“ svého svazu v rekonstrukci.

Připojuji pohlednici s pohledem na objekt Žofína z ptačí perspektivy, pro Vás asi nevidaným, protože je ke koupi pouze v Českém esperantském svazu. - Za dva roky, 1996, se má konat v Praze 81. světový kongres esperanta. Očekává se více než 3000 účastníků z celého světa (ve Varšavě jich bylo 6000), proto by se k vám sjezd nevešel a bude asi v Paláci kultury.

Chtěl jsem Vám připomenout aspoň jeden bod z bohaté historie „Žofína“. (Osobně: mně se ten název po rakouské pilníkem probodnuté císařovně nějak nechce líbit.

S pozdravem

(veterán) Jaroslav Mařík

Komuniko neformala

La 17an de dec. denove ekbrilis solena poezia kultur-programo, en ombro de kristnaska arbo, la 9-a Ĉeĥa-Saksa Tago (ĈESAT) en Ústí nad Labem - Ústí ĉe Elbo - per arioj de operkantistoj kaj koncertmuziko de membroj de la loka teatro, Operejo kaj de Filharmonio de Olomouc, sekvataj vespere de kristnaskaj kantoj kaj regalo per bongustajoj kaj vino, honore al la Zamenhofa Tago kaj tiumonata 90-jariĝo de la meritplena samideano kaj konata roman-tradukanto Josef Vondroušek el Brno. Nunjare aperis libroforme lia traduko „Milito kontraŭ Salamandroj“ de Karel Čapek okaze de la SAT-kongreso en Strážnice, kiun ricevis la kongresanoj. Angela Bode el Saksio ricevis diplomon pri honora prezidanteco de EK Ústí (post la jamaj Vondroušek kaj Mařík). En la tuttaga maratono ne mankis artisma prezento de poeziaĵoj fare de la renoma Eva Seemannová (nunjare rekonita de la ministerio de kulturo kiel unuaranga „aktorino de unuaktora teatro“), kaj eĉ lertaj magiaĵoj de s-ro Vanc. S-ro Mařík parolis pri „65 jaroj de la vivo inter planlingvoj“.

Dum la 8-a ĈESAT en Ústí, komence de oktobro, la germanaj ĉeestantoj estis tiel entuziasmaj pro belegaj arioj (ĉio en E-o) fare de lokaj operkantistoj Smyčka, ruso Basyrev kaj de lia kontrasto ĉeĥo Fiala, filo de la reprezentanto de „Limonádový Joe“, ke ne sufiĉis al ili aplaŭdegoj, - ilin subtenis tamburado sur la benkojn. Kaj jes, ankaŭ membrino de la Praga Opero bele kantis en E-o, sed miakulpe mi ne memoras la nomon. (Praga invalido eĉ larmis pro emocio).

J. Mařík

48-a Kongreso de IKUE de la 8-a ĝis la 15-a de julio 1995 en Olomouc, Ĉeĥio

Altaj Protektantoj de la Kongreso:
Ĉefepiskopo de Prago mons. Miloslav
kardinalo Vlč
Ĉefepiskopo de Olomouc mons. Jan
Graubner

La 48-a Kongreso de IKUE okazos en Olomouc, Ĉeĥio. La urbo (105 mil enloĝantoj), situanta en la mezo de Moravio, estas sidejo de ĉefepiskopo kaj historia rezervejo de monumentoj kaj ekleziaj konstruaĵoj.

La urbo estas facile atingebla el ĉiuj direktoj per ŝoseo kaj fervojo. Aviadile oni povas vojaĝi al Prago aŭ Brno kaj de tie trajne al Olomouc. La aliĝontoj ricevos pli precizajn vojaĝinformojn.

Ni kongresos en moderna kaj komforta salono de Jurista fakultato de la universitato Palacký (strato - ulice 17. listopadu). La loĝadon sekurigas studenta hejmo en du- kaj tri-litaj ĉambroj. Ĉiuj ĉambraj duoj havas propran necesejon kaj duŝon. Je via dispono estos ankaŭ lifto, tamen por pli komfortamaj kongresanoj ni peros pli luksajn ĉambrojn en pensiono Envelopa 50m de la kongresejo (la loĝokostojn oni pagos rekte tie). Manĝado en la studenthejmo povas esti vianda aŭ vegetara, eblas preni ankaŭ bieron, limonadon, kafon aŭ teon.

LA KONGRESA PROGRAMO

Sabato, 8. 7. 1995

Alveno kaj enloĝigo, vespere inaŭguro de la kongreso kun salutparoloj de ĉefepiskopo, urbestro, IKUE-prezidanto kaj gastoj, vespera preĝo.

Dimanĉo, 9. 7. 1995

Rozaria preĝo, Sankta Meso ĉe s-ta Miĥaelo kuncelebrata sub gvido de episkopo Giovanni Locatelli, trarigardo de urbaj vidindaĵoj, prelego „La tago de la Sinjoro: Parolo kaj Pano“, arta programo.

Lundo, 10. 7. 1995

Prelego „La Eklezio laŭ la Koncilio Vatikana Dua, Ekumenismo laŭ Ekleziaj dokumentoj kaj konkretaj spertoj“, Sankta Meso en preĝejo V. Maria la Neĝa kuncelebrata sub gvido de kardinalo M. Vik, diskuto pri katolika atesto en Esperantujo.

Mardo, 11. 7. 1995

Prelego „Novaj disiĝoj en la Eklezio: sektoj kaj ĝiaj defioj“, busado al pilgrimloko Sankta Monteto kun Rozaria Preĝo kaj Sankta Meso, vesperaj programeroj de kongresanoj.

Merkredo, 12. 7. 1995

Ĝenerala Kunveno de IKUE, raportoj de prezidanto, kasisto, landaj reprezentantoj, Sankta Meso ĉe s-ta Maŭricio kuncelebrata sub gvido de episkopo Karlo Otčenášek, vespere diskutado pri la kunveno.

Ĵaŭdo, 13. 7. 1995

Tuttaga busa pilgrimo al Sankta Hostýn, Velehrad, Strážnice, vespere junulara programo.

Vendredo, 14. 7. 1995

Prelegoj „La Eŭharistio konstruas la Eklezion kaj la Papo servas ties unuecon. - Gvidlinioj kaj agadplano de IKUE renkonten al tria jarmilo“, Sankta Meso en katedralo de s-ta Venceslao kuncelebrata en ĉeesto de ĉefepiskopo Jan Graubner, adiaŭa vespero.

Sabato, 15. 7. 1995

Prelego „Faru tion, kion Li al vi diras: Rolo de Maria en la Eklezio kaj IKUE-

movado“, Sankta Meso en la kongresejo kaj solena fermo de la kongreso per la konsekro de la IKUE-movado al la Senmakula Koro de V.Maria.

La prezoj estas en tri lando-kategorioj (C por Albanio, Bulgario, eksa Sovetio, eksa Jugoslavio krom Slovenio; B ceteraj ekssocialismaj landoj; A ceteraj landoj). Pagoj ĝis fino de aprilo rabatitaj.

Kongreskotizoj:

(ĉiuj tarifoj en germanaj markoj)

ĝis 95-04-30 poste:

A	B	C	A	B	C
---	---	---	---	---	---

IKUE-membroj	80,-	40,-	20,-	100,-	50,-	25,-
--------------	------	------	------	-------	------	------

IKUE-junularo, handikapitoj	40,-	20,-	10,-	50,-	25,-	15,-
-----------------------------	------	------	------	------	------	------

Gastoj	100,-	50,-	25,-	120,-	60,-	30,-
--------	-------	------	------	-------	------	------

Busvojaĝoj:	IKUE-membro	15,-	10,-	5,-
-------------	-------------	------	------	-----

IKUE-junularo, handikapitoj, senlaboruloj	10,-	5,-	0,-
---	------	-----	-----

Gastoj	20,-	15,-	10,-
--------	------	------	------

Aligilojn kaj pluajn informojn petu je la adreso: Miloslav Šváček, Tršická 6, 751 27 Penčice.

Jak na kongres do Tampere?

Pro malý počet zájemců rozhodla rada ČES o zrušení autobusového zájezdu na 80. světový esperantský kongres do finského Tampere. Bylo rozhodnuto uspořádat zájezd letecký, na který se můžete přihlásit za výhodných cenových podmínek (cena se příliš neliší od původně plánovaného autobusového zájezdu). Informace: Květa Hubnová, Osadní 2, 170 00 Praha 7, ☎ 02/803608

**Naŝemu jubilantovi
Josefu Vondrouškovi
do daŝŝich let**

Jiři Karen

Jŝi bášnik naŝ, ktery perem vládne,
učitel můj, vzácný člověk, senior.
Ctu Tvé překlady.

Nenalézám chyby žádné.
Přeložils Čapka. Z lásky k němu.
Bez podpor.

A knihy daŝŝí, jejichž překlady Tě
přežijí.

Kritik přísný, vždy však vliďný,
v próze nacházíš poezii,
nad odstavcem zamýšlíš se ne dny,
ale týdny.

Kdo psal česky, slávy dožije se stěží,
kdo psal esperantem, otevíral brány
do světa.

Tož dík za vše. Byla by škoda nežít.
Dík, můj učiteli. Učíls mne létat.
Až jednou spatří světlo světa naŝ Pierot,
svět uvidí, že Ĉech není kaŝpar,
němý mim.

Už teď modlím se k Bohu,
ať kritikům zlomí hrot
a ať slušně zacházejí s překladem
jen z poloviny mým.

(A kdoví jestli)

Ještě mnohá léta,
věčný mladíku,
učils mne létat,
tož meč do ruky, píku
a na nového autora zaútoč.



Vi estas poeto nia, kiu plumon regas,
instruinto mia, rara homo, senioro.
Mi legas viajn tradukojn.
Erarojn ne trovante.
Vi esperantigis Ĉapek. Pro amo al li.
Sen apogoj.
Kaj librojn aliajn, kies tradukoj
transvivos vin.

Kritikanto severa, sed ĉiam afabla,
en prozo poezion vi trovas,
super alineo rezonas vi ne tagojn,
sed semajnojn.

Kiu verkis ĉehlingve, apenaŭ ĝisvivos
gloron,
kiu verkis Esperante, malfermis pordojn
en la mondon.

Do dankon por ĉio. Domaĝe estus ne
vivi.

Dankon, mia instruinto.
Vi instruis al mi flugi.

Kiam foje ekvidos la lumon de la mondo
nia Pieroto,
la mondo vidos, ke ĉeho ne estas
arlekeno, muta mimo.

Jam nun mi preĝas al Dio,
ke Li rompu lancon al kritikantoj
kaj ke ili traktu ĝentile la tradukon
nun duone mian
(Kaj kiu scias ĉu vere)

Ankoraŭ multajn jarojn,
eterna junulo,
vi instruis min flugi,
do glavon en la manon, spadon
kaj novan aŭtoron ataku.



Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069

111 21 Praha 1

☆ STARTO ☆

Periodikum Českého esperantského svazu
Vychází 6x ročně a je určeno členům svazu.

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

Administrátor: Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno 2

Evidence a změny adres: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147 00 Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare.
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio.

Abonprezo: 15 gld.

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

Administrato: Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno 2

Ĉeĥa Respubliko

Podávání listovních zásilek povoleno
JmŘS Brno, č. j. P/3-8847/91 ze dne 28. 8. 1991



Pravděrná adresa vyplí z

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno u pošty
664 03 Podolí u Brna

JOSEF MARTYNEK
BESKYDSKÁ 728
739 61 TRINEC 6